

# Sennacieca REVUO

La sennacieca lingvo esperanto povas esti nur ilo, kiun ĉiu uzas por siaj apartaj celoj. Ni do klopodu ĝin meti unue en la manojn de niaj samcelanoj.

Organo de la  
Tutmonda Laboristaro

Antaŭe  
Esperantista Laboristo

Jara abono: Anglio, 5 ŝil.; Aŭstrio, 150 kr.; Belgio kaj Francio, 9 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 30 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 25 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 6 kr.; Germanio kaj Finnlando, 25 mk.; Hispanio kaj Portugalio, 7 pes.; Hungario, 60 kr.; Italio, 12 lir.; Nederlando, 3 g.; Polio, 300 mk.; Svisio, 6 sv. fr.; Usono, 1 1/4 dol. Oni pagu prefere per monbiletoj aŭ bankĉekoj. — La abonoj komenciĝas en Januaro kaj Julio.

REDAKCIO: **E. LANTY**

24, Boulevard Beaumarchais — PARIS XI (Francio)

ADMINISTRACIO: **L. GLODEAU**

177, Rue de Bagnole — PARIS XX (Francio)

## Unu el Niaj ĉefaj taskoj

Kelkafoje jam mi demandis min mem, per kio nia organizaĵo kaj nia organo povas servi al la tutmonda laboristaro? Al kio ni devas precipe direkti nian laboron kaj celadon? Nia organizaĵo ja ne estas ia batala forto, kiu memstare atakas la nunan sistemon. Ĉiu el ni ja apartenas al difinita politika partio, en ĝiaj vicoj laboras kaj batalas. Ofte disigas nin diferencoj de batalmetodo, de taktiko, eĉ iaforte ili starigas nin en malamikajn vicojn, malgraŭ nia komuna idealo. Ĉi tio estas bedaŭrindaj faktoj, sed fermi la okulojn estus ago de struto, kiu kaŝas la kapon en sablo, ne konduto de matura homo, kiu esploras faktojn kaj laŭeble laboras por forigi la malbonaĵojn de hodiaŭo. Kion povas fari ni, socialistaj esperantistoj, por helpi forigi miskomprenon kaj interbataladon en la vicoj de tutmonda proletariato?

Mi vidas inter la ĉefgvidantoj de socialistaj partioj penojn por rekonstrui unuecon kaj kunlaboradon. Okazas konferencoj kiel la lasta Pariza, dum kiuj oni penas starigi platformon por restarigi Internacion. Bedaŭrinde, en ili partoprenas nur kelkaj landoj. Oni ĝenerale estas tre malmulte informata pri tio, kio okazis kaj okazas inter »malgrandaj« nacioj.

Urĝas organizi tutmondan informigadon. Nia presorgano povas bone plenumi tiun taskon. En ĉiu lando ĝi devus havi korespondanton, kiu liverus al ĝi ne okaze, sed sisteme kaj konstante diversajn dokumentojn, sciigojn, notojn pri diversaj aferoj, kiuj povos interesi tutmondan socialistaron. Temoj estas vastaj: ŝtata organizado; sociaj fortoj; politikaj partioj, ilia forto, programo kaj agado; ekonomia vivo; financoj; krizoj kaj senlaboreco; salajroj, socia leĝaro; laboristaj organizaĵoj: politikaj, profesiaj, kooperaj k. t. p. k. t. p.

Ne domaĝus, se ni eĉ enpresus tute diversajn opiniojn. Ĉar en la nuna tempo regas tia diverseco en la pensmaniero de diverslandaj laboristaj partioj, ke se nia gazeto ne volus tuŝi »incitajn« demandojn, ĝi riskus fariĝi senenhava. Ni ja deziras scii eĉ tion kion pensas niaj kontraŭuloj kaj konkurantoj. Komprenoble certa grado de rezervo en polemikado estas nepre necesa.

En sekvantaj artikoloj mi volas montri, kiamaniere mi komprenas la programon de nia organo.

La ĉefa demando estos, ke la Redakcio akiru en ĉiu lando fidindajn kaj kompetentajn korespondantojn kiuj promesus konstante kunlaboradi. Ĉi tie mi forigu unu ŝajnan malhelpaĵon. Eble oni pensos, ke la socialistoj-esperantistoj estas ankoraŭ tiel malmultenombraj, ke neeble estos trovi ĉie kompetentajn korespondantojn. Tion oni povas forigi per tio, ke la korespondanto povas liveri ne originalaĵojn, sed tradukojn. Oni ja povas facile sin turni al redaktoroj de gazetoj, gvidantoj de diversaj organizaĵoj, parlamentanoj, kaj ĝenerale al kompetentaj personoj, ke ili verku artikolojn speciale por eksterlando. Korespondanto ilin tradukos kaj forsendos. Li do povas esti eĉ persono, kiu mem ne kapablas verki, tamen li devas havi bonajn rilatojn kun laborista vivo en sia lando, esti bone pri ĝi informita, por ke li elektu taŭgan materialon, kiu efektive interesus eksterlandanojn; fine li devas esti persono fidinda, kiu promesus ĉiam akurate kolekti la materialon kaj ĝin liveri al la Redakcio. Tiamaniere S. R. fariĝus granda informa internacia gazeto, fonto de sciigoj por ĉiuj laboristaj gazetoj en tutmondo.

Sed tio estas nur komenco. La nombro de socialistoj, scipovantaj esp.on, estas tiel malgranda, ke la direktaj artikoloj kaj sciigoj, se ili aperus nur en esp. gazeto, havus nenian valoron. La devo de la korespondantoj estus retraduki la aperigitan materialon nacilingven, kaj publikigi ĝin

en siaj lokaj laboristaj gazetoj. Ekzemplerojn de gazetoj, kie aperos la retradukoj, oni devus sendi al la lando, el kiu devenas la sciigo. Nur tiamaniere ni povos pruvi al la socialistaro, ke nia laboro kaj penadoj efektive ion valoras.

K. DOMOSLAWSKI (Warszawa)

## Kalumnia vortmilito

### LA GERMANA MONO

La Franca ĵurnalaro diras ade ke de la prezo de l'germana mono konstante malpliĝas, tio okazas ĉar la Germana registaro volas tiun konstantan falon. Mi havas dubojn pri la praveco de tiu aserto. Efektive ĉu se la falo de l'Germana monprezo kaŭzas faciligon por Germana eksportado ĝi ne male alportas malbonaĵojn, igante neblaj aŭ preskaŭ tiaj la importadojn aliajn el tiuj de kruda materialo uzota por fabriki por eksteraj landoj? Konsekvence la falo de l'monprezo kaŭzus ke la eksteraj landoj ne plu produktus ion por Germanujo — dum plimultiĝus la produktado de Germanujo por l'ekstero. — Neniu plu laborus por la Germano, sed dume la Germano laborus multe por la aliaj. — Stranga idealo vere tiel celadus la Germana registaro, dum la idealo al kiu klopodas pli-malpli inteligente ĉiu individuo estas: povi konsumi kiel eble plej multe da produktoj de l'naturato kaj de l'laborpeno de aliaj kaj esti devigata kiel eble malpli multe laborpeni. Se vere tia celo estus tiu de l'Germana nacio: ricevi nenion kaj doni multe — oni ne devus mallaŭdi ĝin — kaj oni mallaŭdas ĝin kiam oni kulpigas ĝin ke ĝi priagadaĉas sian monprezon — sed male laŭdi ĝin laŭtege; tio pruvus ke ĝi volas, produktante por la aliaj, kompensi la malbonon kiun faris ĝia militistaro detruante en alies posedaĵo.

Nu! kial tiuj vortmilitoj da mallaŭdoj kontraŭ Germanujo pri la malplivaloriĝo de la Germana mono. Ili estas certe malpravegaj.

Aŭ unuasupoze la aserto ke la Germana registaro volas la malkariĝon de l'"mark" estas malvera — kaj, ĉar la aserto de tiu volo estas ĉiam akompanata de mallaŭdo al ĝi — aŭ unuasupoze tiu aserto estas malvera kaj ĝi estas abomeninda kalumnio intencita por akriĝi malamon, — aŭ, duasupoze, ĝi estas vera kaj pravigas ke oni mirdemandu kial la ĵurnalaro Franca, kiu devus ĝojegi ke la Germanoj volas produkti pli ol ili konsumas, klopodadas misprezenti tiun agadon tiam laŭdindan kvazaŭ abomenan aĝon de hipokriteco? Ĉu nescio aŭ malamcelado, makiaveleco kiu ree kaj ade volas mistaksi la intencojn de la najbaro kaj klopodas malamigi lin eĉ pri liaj agoj plej ŝatindaj?

L. Brossier

Franca kaj Germana laboristoj kiuj interŝanĝis dekon da leteroj pri sia komuna sorto, pli faris por la paco ol plej elokventa parolado de iu ajn pacifisto.

## 2<sup>a</sup> Kongreso de S. A. T.

Frankfurt a. Main (Germanio)

12—16 aŭgusto 1922

### 3<sup>a</sup> Komuniko

*Kongresejo.* La Kongreso okazos de 12 ĝis 16 aŭgusto (samtempe kun la Internacia Sindikata Kongreso de la Ministoj) en la salonego de la fama restoracio „Frankfurter Konzertgarten, Allerheiligen Tor, Ecke Lange Strasse“, meze de la urbo.

*Kongres-Komitato:* Prezidanto, K<sup>do</sup> Jean Roth, Rodelheimer Landstr. 131 III, Frankfurt a. M.-Rodelh. (Germ.).

*Kongres-Kotizo.* Anglio, 3 ŝil. — Aŭstrio, 100 kr. — Belgio kaj Francio, 7 fr. — Bulgario kaj Rumanio, 20 lev. — Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 20 kr. — Danio, Norvegio kaj Svedio, 3½ kr. — Germanio kaj Finnlando, 20 mk. — Hispanio, 4 pes. — Hungario, 50 kr. — Italio, 9 lir. — Nederlando, 2 guld. — Polio 200 mk. — Svisio, 3,50 fr. sv. — Usono, 80 cend.

*Pago:* Per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko en registrita letero adresota al kasisto: K<sup>do</sup> Rudolf Mayer, Rodelheimer Landstrasse 24 II, Frankfurt a. Main. La ĉekoj estu prefere negoĉeblaj (ŝanĝeblaj) ĉe la „Frankfurter Sparkasse“ — La germanianoj ĝiru sian kotizon al poŝtĉek-konto N<sup>o</sup> 50280, Frankfurt.

Por ĉiu informpeto postulanta leteran respondon oni aldonu unu respond-kuponon.

*Aliĝiloj:* Valoraj estos nur la aliĝiloj akompanataj de la kotizo. La aliĝilon tekstu legeble.

\*

*Unua listo de aliĝoj ricevita ĝis la 15<sup>a</sup> Februaro (1).* K<sup>doj</sup> Jean Roth, Heinrich Ahl, Rudolf Mayer, Heinrich Frickart, Ludwig Puff, Heinrich Kempf (de Frankfurt a. M.) — Bannier, Glodeau, Lanty (Paris). — Habert J., 23 bis rue Morère, Paris XIV. — Piron, 50 allée du Midi, La Garenne Colombes (Francio). — Hugot-Raison, cours Jacquin, Troyes (Francio). — Guihéneuf, ĉe Michal, en Sillans (Isère-Francio). — Van Aelst, 107 rue Emile Feron, St. Gilles-Bruxelles. — K<sup>ino</sup> Van Aelst, (sama adreso). — K<sup>do</sup> Morra Raffael, Ufficio Costruzioni (Caserta) *Formia* (Italio). — Hermann Remers, Luisenstrasse 97, Düsseldorf (Germ.). — Paul Köckeritz, Tharandter Str. 6 III, Dresden-Löbtau.

*Eldonaĵoj.* La kongreskomitato ĵus eldonis serion da 10 belegaj poŝtkartoj diverskoloraj kun teksto reklama pri nia 2<sup>a</sup> Kongreso. Prezo afranke: 3 respondkuponoj (aŭ 10 Mkg. por germanianoj).

Jean Roth, prezidanto de la Kongres-Komitato

(1) Je la 1-marto (ekstrema limo por sendi la presotaĵojn al Leipzig) ni estas ricevintaj nur parton el la komuniko redaktata de la Kongres-komitato (niaj Frankfurt, aj K<sup>doj</sup> estas nedubeble senkulpaj en tiu prokrasto, tial tiu 3<sup>a</sup> Komuniko estas iom seka, kaj tial ni povas publiki nur la aliĝojn enregistritajn antaŭ la 15<sup>a</sup> februaro.

La sekretario de S. A. T.




# EL RUSIO

## Ni helpu la rusan popolon

El multaj korŝiraj leteroj, kiujn ni jam ricevis de Rusio, ni enpresas la du ĉi-subajn. Ili estas sufiĉe elokventaj por ke ni ne bezonu aldoni iun komenton. Kiu povas donaci, tiu ne prokrastu. — Red.

El la revuo "Clarte", kies direktoro estas *Henri Barbusse*, rajtigite ni elprenis la ĉi-apudan bildon. — Red.



### Karaj Kamaradoj!

Milionoj da viaj rusaj fratoj nun mortas de terura malsatego.

Milionoj da malgrandaj infanoj etendas al vi siajn sekigitajn manetojn, petante peceton da pano. Vi ne povas imagi al vi la teruraĵojn de mortanta apud-Volga regiono, la regiono, kiu iam nutris ne sole Rusion, sed sendis sian panon eĉ eksterlanden, la regiono tiel sindoneme helpinta al nia revolucio, la regiono, kiu en 1919 plenumis pli ol 150% da grajndevpago nun mortas de malsato. Pli kaj pli laŭte sonas, plenaj da neesprimebla teruro, junaj infanaj voĉetoj degeligante en homaj koroj eĉ eternan neĝon. La infanoj, la enkorpiĝo de niaj esperoj, pereas senriproĉe. Centoj da miloj de estingiĝantaj okuletoj rigardas vin, niaj karaj kamaradoj, kun fajreto da espero ke vi etendos al ili gepatrajn ĉirkaŭprenojn, ke vi karesos tiujn malgrandajn vivajn oferojn de senlima popola doloro.

Karaj amikoj helpu al ni venki nian lastan malamikon, ĉar ni laciĝis kaj tiu ĉi batalo estas superforta por ni, se niaj amikoj ne helpos.

Karaj kamaradoj, samideanoj, forviŝu la larmojn de pereanta juna generacio, de triumfontaro en nia sankta batalo. Oferu por ĝi kiom vi povos: monon, vestaĵojn ktp. Prenu niajn infanojn en viajn domojn kaj nia posteularo benos vin.

Tiflis, 15. Januaro 1922.

*Stefano Akimod (Ruĝarmeano).*

### Karaj Samideanoj!

Kun ĝojo mi estas preta korespondadi kun vi pri moralaj temoj. Mi estas poŝttelegrafisto, 27-jara, havas edzinon kun malgranda 9-monata infaneto.

Ho! Karaj Amikoj! Ĉu vi povas imagi kian teruran malsaton ni suferas ni, apud-Volganon? Ĉu vin atingis niaj ĝemoj?

La malfeliĉaj malsatantoj manĝas katojn, hundojn, ratojn, ĉevalojn kaj eĉ homajn kadavrojn . . . Oni ne havas tempon por enterigi multnombrajn kadavrojn, kiujn hundoj ŝtelas kaj manĝas kune kun la mizeruloj — homoj . . .

Neesprimeblan teruron travivas ni, apud-Volganon. Ĉiutage la kruela permalsata morto pereigas milojn kaj dekojn da miloj da malfeliĉaj malsatantoj.

Ho! Karaj fratoj! Ne pro mi, sed pro mia suferanta kaj mortanta antaŭ miaj okuloj, mia kara infaneto, mi petegas vin! Kompatu kaj helpu min por savi de la terura morto mian infaneton; la patrino tute malfortigita de la malsato ne havas mamlakton por nutri lin, kaj liaj krioj pri mamlakto plorigas ŝin senespere . . . tre terureksciita stato.

Helpi oni povas per *tutruslanda Esperanta Oficejo* por helpo al la malsatantoj (*Petrograd, Haljanskaja n° 31*) sendante al tie pakajojn kun nutraĵoj.

*Karaj fratoj! ĉu vi ne kompatos kaj rifuzos helpi? . . .*

Okradak, 28. Januaro 1922

*J. Grafov*

## Kion ni devas fari? <sup>1)</sup>

Ĉiu scias, kian situacion trafis nia lando: Ekonomia senordo, kiun naskis la sepjara milito, detruis la tutan mastrumadon de Rusio, okazigis malsaton kaj malebligis en tiaj kondiĉoj senprokraste efektiviĝi komunismon, kion intencis komence fari Rusa komunista Partio kaj Sovjeta Registaro. Dum kelkaj jaroj Sovjeta Registaro insiste penis efektiviĝi sian programon, fordetrante ĝisfunde ĉiun plej malgrandan detalon de burĝa regnokonstruo kaj konstruante mondon de Komunumo. Ĉiu Ruso scias, ke ĝi faris tiucele ĉion, kion ĝi povis. Sed la tuta burĝa mondo komencis batali kontraŭ Sovjeta Rusio. Grandegaj armeoj dum kvar jaroj atakis la malsatan kaj malriĉiĝintan Rusion. Kontraŭ-revoluciaj konspiroj malamikklopodadis. Ĉion venkis la rusa popolo, suferanta kaj malriĉa, sed glorinda pro sia revolucia potenco. Sed la grandega kaj laciga milito prenis de la rusa popolo tiom da fortoj, ke ĝi ne povis venki unu el siaj kruelaj malamikoj — la ekonomian senordon. Tial Sovjeta Registaro decidis: anstataŭ tute foriri de la revolucia scenejo, anstataŭ cedi al la burĝara atako kaj perdi ĉion ĵus akiritan, estas pli bone por la rusa proletario, provizore rezigni je kelkaj revoluciaj al militaĵoj, por povi poste iom post iom aliri la komunismon. Tial estas komencita nova ekonomia politiko, reapergiganta privatajn komercon, industrion, mastrumadon ktp. Ĉiuj burĝaj gazetoj nun firaportas pri perfido de Sovjeta Registaro rilate komunismon, kaj multaj laboristoj kredas tion. Estas do urĝa tasko de ĉiuj rusaj esperantistoj, havantaj eksterlandajn korespondantojn inter la laboristaro, klarigi kion signifas la nova ekonomia politiko de Sovjeta Registaro. Nur provizore la rusaj komunistoj forlasis kelke da punktoj de sia programo: Por savi la landon de definitiva ekonomia detruigo; por restigi la ŝtatan regadon en laboristaj manoj; por ne permesi al burĝoj tute reekposedi la landon; por havi povon, post ŝtata ekonomia renaskiĝo, rekonstrui laboristan komunumon. Ne kredu do, kamaradoj, je gazetaj artikoloj pri perfido de rusaj komunistoj al komunismo kaj rusa popolo. Tion tute ne akcelas la Sovjetoj, ŝanĝante sian politikon.

En la lando estas malsato. Terura malsato falĉanta milcentojn da homoj. La Sovjetoj faras ĉion eblan por helpi la malsatantojn. Ĉiutage ĉiu urbo, urbeto, vilaĝo, fabriko kolektas monon, grenon kaj aliajn oferaĵojn. Ĉiutage en la tuta lando estas farata grandega tasko sed por venki la mizeron necesas centobligi la laboron.

Helpu ni, rusaj esperantistoj, kiel eble plej: Ne parolante pri senpera helpo de apartaj esperantistoj kaj organizaĵoj, ni devas en ĉiu letero forsendota eksterlanden, en nia presorgano, ni devas peti al niaj tutmondaj samideanoj pri helpo. Se por ili ne estas malgravaj interesoj de tutmonda revolucio, kies avangardo estas kaj restos la rusa proletario, ili devas helpi por ke ĝi estu kapabla daŭrigi la bataladon.

Ni ne devas plendi je indiferenteco de Sovjeta Registaro al esperantismo, ĉar nun ĝi estas tro okupata de pli gravaj problemoj. Cetere ĝis nun ni tro malmulte faris da fakta helpo por tiurilate esti tre postulemaj: Ni do uzu ĉiamaniere nian esperantan movadon por la celoj de la rusa proletario, laciginta en la batalo, malsatanta kaj bezonanta helpon de eksterlandaj kamaradoj. Tiamaniere ni pruvos, ke nia movado ne estas amuzo de senzorgaj inteligentuloj, sed ke ĝi meritas seriozan atenton kaj ne devas esti forgesata de Sovjeta Registaro.

V. V.

(1) Tiun artikolon ni prenis el "Ruĝa Esperantisto" (N. Novgorod) — Red.

## Por la malsatanta rusa popolo

### 6<sup>a</sup> listo de monoferantoj

Durand (Lyon) 5 fr.; Hemy (Bousignies) 9 fr.; Guihèneuf 24 fr.; lia kunulo 10 fr.; Rousseau 16 fr.; Palix 5 fr.; Deleger 5 fr.; Aubert 4 fr.; Lanty 25 fr.; Migny 5 fr.; Piron 2,50 fr.; Grupo el Lyon 50 fr.; Gerber (Nürnberg) 2 mk.; Gottgetreu (Hannover) 10 mk.

Kun la antaŭaj listoj: 451,50 fr. fr.; 326 mk. G.; 450 mk. P.; 9 kr. Ĉ.

## Senperforta revolucio

Ne ekzistas demando, kiu por la estonto de la popoloj havas tiel eminentan gravecon kiel la demando pri senperforteco. La principo de la fortenco estas depost jarcentoj al fundamento de la komunvivo de la popoloj kaj de la individuoj. Perforto regas ĉion: familion, ŝtatajn aranĝojn, lernejon, juĝdecidon, internan kaj eksteran politikon. Naturo, scienco, historio estis konsiderataj nur laŭ tiu-ĉi vidpunkto,



ĉiuj esploradoj estis farataj nur en tiu-ĉi senco. Kio ne submetiĝis al principo de fortenco estis perfortata, mortsilentigata.

Sed tiu-ĉi principo plene malsukcesis, bankrotis. La mondmilito liveris la plej drastan ekzemplon pri tio.

Se ĝi estas ankoraŭ nuntempe reganta, tio estas unuflanke, nur ŝajno, kaj aliflanke nur pruvo ke fundamentaj ŝanĝoj en la vivo de la popoloj ne efektiviĝos de hodiaŭ ĝis morgaŭ sed nur iom post iom.

Kiu vivas kaj ne vegetas kiel maŝino, tiu ankaŭ scias ke ni jam staras meze de la ŝanĝo de perforteco al senperforteco, ke la nombro de la homoj kiuj adoptas vivon al senperforteco estas senĉese kreskanta.

Kiu estas la plej eminenta homo de la nuntempo? Usona aŭtoro *John Haznes Holmes* respondas: **Gandhi**.

La vivo kaj agado de Gandhi servas al principo de senperforteco al libereco, al memdestinrajto de la popoloj kaj de la individuoj. Gandhi, la sankta, kiel li estas nomata en Hindujo, predikas al Hindoj pacan bataladon sur la vojo de senperforteco por akiri sendependecon de Britlando, nova revoluciamaniero prepariĝas, Revolucio sen-fizika forto sed de pasiva kontraŭstaro, de nekunago.

Detalojn pri la batalmaniero donas *Taraknath Dass* en „The Survey“ publikata en New York. *Taraknath Dass* akcentas, ke li observadas la de Gandhi gvidata revolucion kun varma simpatio. Li komencas sian verkon per la vortoj: „La ŝpinanta rado decidas la sorton de



Hindujo; la ŝpinrado estas la emblemo de la Hinda Respubliko.“ La senperforta batalado komencis per la bojkoto de la britaj teksaĵoj; ĝi estas sukcese plenumita. Britaj teksaĵoj kuŝas amase en la havenoj de Hindujo. Komercestoj kaj oficistoj de Lancashire alvokis la Parlamenton de Britujo, Sekve de tio la Brita Registaro sendis oficialajn agentojn Hindujon por kontraŭagadi la movadon. Konfidenta letero de la Registaro al siaj reprezentantoj montras sian embarason: „Estu anoncata al la popolo, ke Hindujo ne povas produkti tiom, kiom uzos la popolo, ke la bojkoto de eksterlandaj teksaĵoj kaŭzos pliigon de la prezoj, kiel rezultato de la agado de S<sup>ro</sup> Gandhi.“

La eminenta gvidanto de Hindujo jam antaŭe estis ekkonanta la pravecon de tiu ĉi aserto. Li estis aspiranta pligrandigi la kotonindustrion de sia lando. Ŝpinradoj estis disdonataj al ĉiuj familioj; viroj, virinoj kaj infanoj ŝpinas, per la man-tekstilo la ŝtofo estas fabrikata. Sed por malhelpi la pliigon de la prezoj, Gandhi jam interkonsentis aranĝojn kun la produktantoj kaj la komercistoj.

En la sudo de Hindujo 6 distriktoj, konstruis memstaran ŝtaton, kiuj vole ignoras la britan estron. Tie jam hodiaŭ flirtas la flago kun la emblemo de la ŝpinrado.

En decembro 1920 Mohatma Gandhi aperis antaŭ la hinda Kongreso submetante sian programon de senforta kontraŭstaro, de nekunlaboro kun Britujo. Li postulis memadministradon por la popolo pere de pacaj kaj leĝaj rimedoj. Unu provinco post la alia voĉdonis pri tiu ĉi postulo. Kaj la rezultato? Nur 2 el 30000 personoj malaprobe voĉdonis. Tiamaniere popolo decidis bataladi por sia sendependeco ne per la glavo kaj la forto sed sur la vojo de senperforteco.

La bojkotado ne nur koncernas la britajn teksaĵojn. Gandhi instruas la Hindojn rifuzi kun Britujo ĉian negocon, precipe pri alkoholo kaj narkotaĵoj. Neniu Hinduo devas aliri anglan juĝistaron, nek kunlabori kiel juĝisto nek kiel defendisto, neniu hinda infano viziti anglan lernejon, neniu hindu funkcii tie kiel instruisto, ĉiu devas redoni titolojn kaj honorigilojn ricevitaĵoj de la angla registaro.

Rilate al progreso de la movado skribas doktoro Ansari sekretario de la hinda kongreso: „Gandhi praktikas la ideojn de Thoreau kaj Tolstoj; li ekvekis movadon, kiu unuigas ĉiujn klasojn, rasojn kaj sektojn de Hindujo al nova spirita ligilo. Li faris el la pasiva kontraŭstaro direktilon de tuta nacio. Agoj parolas pli klare ol vortoj. Estas malfacile por eksterhindujano klarigi al si la grandan revolucion, kiu dum la lastaj monatoj okazis en la spiritostato de la hinda popolo. 25—26 miloj da Hindoj redonis la titolojn liveritaĵoj al ili de la angla registaro, kiel unua inter ili estas *Rabindranah Tagore*. Centmil Hindoj, kiuj pli frue ĝuis bonvivon donis sian tutan havon al la movado. Eminentaj advokatoj forlasis sian praktikon, por tramigradi la landon kiel predikistoj kaj varbi Gandhianojn. La plej mirinda fakto estas, ke en Delhi perfortaganta popolamaso de 80 000 homoj (depost soldatoj kaŭzis kelke da mortintoj kaj 200 vunditojn) unu ano de Gandhi, alvokante iliajn pli bonajn instinktojn, trankvile disgvidis ilin. Similaj okazoj estas ĉiutage observataj.

En la antaŭparolo de sia libro „Memadministrado de Hindujo“ Gandhi skribas: „Mi predikas amon anstataŭ mal-

amon, memoferadon anstataŭ perfortecon. Mi bataladas la brutan forton per anima pero. Mia libro estas severa kondamno de moderna civilizacio; ĝi estis verkata en 1908. Sed mia konvinko hodiaŭ plue pli profundigis.“

La kontraŭaĵoj en la okcidentaj landoj estas tute malsamaj komparitaj kun Hindujo. Tamen mi kredas ke la principo de la senperforta revolucio povas esti sukcesplene uzata en nia vivo. Ĉu ni ne subtenas ĉiutage kapitalistajn organizaĵojn, ekzemple aĉetante ĉe ili niajn vivbezonaĵojn, uzante iliajn servojn kontraŭ pago k.t.p.

En kelkaj landoj jam ekzistas socialistaj produktad- kaj konsumadsindikatoj, bankoj kun kooperativaj fundamentoj k.t.p. Sed bedaŭrinde tiuj organizaĵoj ĝis nun estas nur naciaj.

Ni pritraktu kaj diskutu en niaj rondoj tiun-ĉi aferon. Ni disvatigu tiujn ideojn por prepari kaj konstrui internaciajn fundamentojn de socialista produktadmaniero. — Liberigante nin de la kapitalista ekspluatado pere de la senperforta revolucio.

H. K.

## Pri Racia Edukado

Racia edukado devas antaŭ ĉio esti plene *neŭtrala*-t.e. ĝi ne devas pritrakti tiujn temojn, pri kiuj ne ekzistas plena certeco: ekz. la religio, la politiko kaj kelkaj sciencaj teorioj, kiuj ankoraŭ nun estas nur hipotezoj.

Fakte la *racia* instruado nepre forĵetas la *dogman* (aŭ deduktan) metodon, kiu postulas de la infano nur fidon al la libro aŭ al al edukisto; kontraŭe, tia instruado havas kiel fundamenton la *pozitivan* (aŭ induktan) metodon, kiu necesigas la observemon, postulas la kontrolemon kaj alvokas la kritikemon.

Nu, la problemoj, kiuj ankoraŭ nun naskigas tiom da disputadoj (ofte akraj) inter la filozofoj, la sciencistoj kaj ĝenerale la kleruloj, estas precize tiuj, kies solvojn oni ĝis nun ne povis atingi per la pozitiva metodo, la sola kies rezultatoj trudiĝas al ĉiuj sendepende de ĉies gustoj kaj tendencoj.

Pri tiuj temoj, la homo unue formas al si opiniojn laŭ siaj propraj gustoj laŭ sia temperamento kaj sia edukiteco — kaj nur poste li klopodas pravigi tiujn opiniojn per rezonadaj havantaj sciencajn aspekton.

Oni do komprenas kiel absurde estus proponi al infanoj tiujn temojn, kiuj postulas multajn konojn kaj ĝeneralajn ideojn.

Ĉio farebla tiuflanke estas prezenti al la infano *tute pretajn* ideojn, kiujn ĝi des pli volonte akceptos, ju pli forte ĝi fidas al sia instruisto — sed tio ĉi ne estas *edukado*.

\* \* \*

Kelkaj (ankoraŭ tro multaj) edukistoj kaj la plimulto de la gepatroj malprave kredas, ke ili devas «plidaŭrigi» sin en la infano kaj trudi al ĝi tiujn samajn konvinkojn, kiujn ili posedas.

Kompreneble ĉiu el ni opinias siajn konvinkojn la plej pravigeblajn, kaj siajn juĝojn la plej saĝajn. Pro tio, mi komprenas, ke la edukisto aŭ la gepatroj ĝojas tial, ke ili «spegulas» sin en la infano.

Sed kvankam tiu ĉi deziro modeli la edukaton laŭ la portreto de la edukanto estas tre laŭhoma, tamen ĝi estas kondamninda, kaj ĉiu konscienca edukisto devas ĝin subpremi.

Ĉiu ja scias, ke la infana cerbo estas altgrade sugestiebla, ke ĉia ideo (eĉ absurda) povas fine ĝin enpenetri, se nur tiu ĉi ideo estas lerte prezentata kaj ofte ripetata.

Nu, estas kondamninda perforto de ĉia edukisto (aŭ de la gepatroj) profiti la sugestieblecon de infano aŭ ĝian intelektan malforton por penetrigi en ĝian cerbon, kiel konvinkon, ian ajn hipotezon.

Ni memoru, ke infano apartenas nek al sia instruisto, nek al la ŝtato — sed al si mem.

Do, kion oni devas fari en la lernejo? vi demandos al mi.

Mi respondas: 1<sup>o</sup> instrui la infanon pri la *nepre necesaj* konoj, kiujn ĝi bezonos dum sia vivo, kaj kiuj estos la «fundamento» sur kiun oni elfaros la tutan solidan konstruaĵon legado, skribado, kalkulado — poste geografio, historio pri la civilizacio, desegnado; kaj ĉio tio ĉi jam estas multo, se oni volas ĝin bone efektiviĝi.

2<sup>o</sup> instrui la infanon pri tio ĉi: kiel oni devas ... lernadi!

Ĉar, ne dum la kelkaj jaroj, kiujn ĝi pasigas en la lernejo, havas infano sufiĉan tempon por lerni multe.

Plie, kiam ĝi forlasos la lernejon, tiam ĝi rapide forgesos multajn lernitaĵojn.

Tial la plej grava afero ne estas, ke oni plenigu ĝian cerbon je konoj, sed prefere ke oni montru al ĝi labormetodon fidindan kaj allogan, kiu disvolvinte ĝis nun ĝiajn latentajn kapablojn, ebligas al ĝi konstantan perfektigadon per siaj propraj rimedoj, t.e. per siaj propraj observemo, kontrolemo kaj kritikemo.

Poste la infano, fariĝinte maturulo, povos elekti tiun aŭ alian opinion en la plenece de sia juĝo.

Tiun metodon mi supre menciis: ĝi estas la *dedukta* metodo, kiu, procedante de la simplaĵo al la komplikajo, de la detalo al la tuto, de la eksperimento al la leĝo, implikas nenian kredagon, stimulas la scivolemon, plifaciligas la cerban lertecon, unuvorte ebligas la plenan ampleksigon de l' personeco dank' al gimnastiko metoda kaj rezonita.

La edukistoj donu la plej vastan lokon al tiu pozitiva metodo, ili senkompatate forjetu de sia instruado ĉian necertajon, kiu postulus de la infano kredagon, unuvorte ili estu *gvidantoj* prefere ol *instruantoj*: tio ĉi estas la sola maniero formi homojn toleremajn, grandanimajn kaj kapablajn esploradi senpasie kaj senpartie tiujn problemojn, kiuj nuntempe devus ardigi la tutan homaron.

A. ROBIN

## Municio por Sennacieca Revuo

(Ricevita dum Februaro)

AŬSTRIO: Stöber, Otto 200 kr. A. — Ticher, Anton 200 kr. A. —  
 — ĈEĤOSLOVAKIO: J. Batta 29 kr. Ĉ. — Laborista Kurso en Prešov 15 kr. Ĉ. — FINNLANDO: Romppainen, Leo 50 mk. G. + 4 mk. F. —  
 FRANCIQ: Nicolle 2 fr. — Solsona 5 fr. — F.ino Feuiller 5 fr. —  
 Dubois 1 fr. — Durand, J. B. 5 fr. — Testud 1 fr. — Bonnie 4 fr. —  
 Nicolat 1 fr. — Dutestre 2 fr. — J. Habert 10 fr. — Guiheneuf 1 fr. —  
 — Lab. esp. Grupo Lyon 25 fr. — Lanty 100 fr. — Glodeau 5 fr. —  
 NEDERLANDO: Meyer 5 fr. — NORVEGIO: Murib 8,80 fr.

Sume: 180,80 Frankoj; 50 Markoj G.; 400 Kr. Aŭst.; 29 kr. Ĉeĥ. 5 Markoj Finn.

## Antaŭ la novaj elektoj

AL POLA PARLAMENTO

La nuna konstituanta Parlamento (Sejm) en Polio baldaŭ jam finos sian vivon. En sia februara kunsido ĝi decidis laŭ socialista propono, ke la novaj elektoj okazu tuj post la akcepto de nova elekta leĝo, nun ankoraŭ diskutata. La tuta lando senpacience atendas jam de longe, kiam do mortos per natura morto la nuna parlamento, ĉar ĝi jam sufiĉe diskreditiĝis en la okuloj de popolamasoj kaj de ĉiuj progresemaj homoj.

Antaŭtempe estas profetadi pri la rezulto de proksimiĝantaj elektoj. Pri kelkaj cirkonstancoj tamen mi volus atentigi la eble ne sufiĉe informitan internacian legantaron, pri la vivo de nia lando.

1. La nova parlamento estos la reprezentantaro de la tuta lando, kion oni ne povas diri pri la ĝisnuna. Multaj provincoj de la nuna Polio tute ne partoprenis en la antaŭaj elektoj kaj ne estas reprezentataj. La grandega teritorio, kuŝanta oriente de la antaŭa Pola Reĝlando, trans la rivero Bug, (kiu transiris al Polio laŭ la Riga traktato), tute ne partoprenis en la elektoj (escepte la regionon de Bialistok). Tiamaniere granda parto de loĝantoj de Polio, inter ĝi multaj alinacianoj: Ukrainoj Blankkrutenoj, Hebreoj — tute ne havas siajn reprezentantojn en la nuna parlamento. Estonte estos jam aliel.

2. En okcidenta Polio Germanoj ne ĉie partoprenis la elektojn. Nur en Pomeranio ili voĉdonadis (ĉar tie elektoj okazis jam post la rajtigo de la Versailles 'a traktato), sed en Poznanio ili bojkotis la elektojn.

3. En orienta Galicio (grandaparte loĝata de Ukrainoj) elektoj en 1919 ne povis okazi pro la pola-ukraina milito. Tial estis akceptitaj kiel reprezentantoj de tiu ĉi provinco la antaŭaj deputitoj al la Viena parlamento (sed nur Poloj!). Poste, pro la ĝis nun ne solvita ukraina demando, oni tute ne aranĝis tie elektojn. Kiamaniere estos dum proksimiĝantaj elektoj, mi ne volas antaŭdiri. Eble la Ukrainoj bojkotos ilin, ĉar ili (en ilia plej granda parto) ne volas konsenti pri rajto de pola ŝtato en orienta Galicio.

4. En estonta sejmo havos jam siajn reprezentantojn: parto de supera Silezio, laŭ decido de *Ligo de Nacioj* transironta al Polio (laborista regiono!) kaj Vilnio (regiono de Vilno), kies provinca sejmo nun proklamis sian aliĝon al la pola ŝtato.

5. La unuajn elektojn bojkotis la komunista Partio, kiu tiam esperis je revolucio kaj tuja realiĝo de proletaria reĝado (konsilantar-sistemo). Ĉar tiuj esperoj ne realiĝis, oni certe povas supozi, ke la komunista Partio volos ankaŭ ekiri al elekta batalo.

El tiuj-ĉi pripensoj ni jam vidas, ke la estonta parlamento multe diferencos de la ĝisnuna. La alinaciaj elementoj estos pli fortaj. Ĝis nun estis en la parlamento kelke da Germanoj kaj dekelke da Hebreoj, nek unu Ukrainoj aŭ Blankkruteno. Se oni konsideros ke alinacianoj formas pli ol trionon de la loĝantaro de nuna Polio, ni povas facile konkludi, kiom grava estas la demando. La nuna parlamento ne konsciis la gravecon de naciaj demandoj, ĉar la alinacianoj staris ekstere. Laŭ ĝia konsisto ĝi estis unuforme-nacia, preskaŭ ekskluzive pola. Aliel estos



en estonto, malgraŭ tio, ke ekz. la tre multenombraj Blankrutenoj estas ĝis nun tre malkleraj kaj grandaparte ne konscias sian naciecon. Kompreneble la naciaj malplimultoj en la parlamento subtenos la opozicion. Ĉu ilia ĉeesto kaŭzos internajn batalojn kaj en kia grado, estas malfacile antaŭdiri. Estonto montros...

Duaflanke esperebla estas plifortiĝo de socialistaj voĉoj. Dum antaŭaj elektoj nur okcidenta Galicio sendis preskaŭ 50% da socialistoj, aliaj landpartoj donis malgajnnon al socialista Partio. (Pri la kaŭzoj mi skribis pli detale en „Esperantista Laboristo“ 1921 Nr. 3.) Nune post tri jaroj de malkaŝa agado kaj propagando, ni rajtas esperi pli bonajn sukcesojn. Al multaj malfermiĝis jam la okuloj, ili vidas la realan valoron de partiaj programoj. En la unuaj monatoj de la liberiĝo, la reakcio blindigis multajn per sia devizo: *Dio kaj Patrujo*. Nun eble jam tio ne okazos, almenaŭ ne en tia grado.

Sed je la dua flanko socialistoj havos novan konkuranton — la komunistojn. Nur du deputitojn havas tiuj ĉi en la nuna parlamento, unu el ili estis elektita en la listo de socialista Partio, alia — kiel popolano, poste ili forlasis tiujn partiojn kaj formis komunistan klubon. (La lasta estas nun malliberigita). Kiom grandan influon inter la laboristaro havas efektive la komunistoj oni ankaŭ povas nur supozi. Ili ja estas persekutataj, malliberigataj, ilia partio laŭleĝe ne rajtas ekzisti. Tial nur la voĉdonado povos montri ilian relativan forton.

Inter la burĝaj partioj ekzistas multaj dividoj kaj partigoj. Pri ĉiuj estas malfacile paroli. La naciaj-demokratoj (naciistoj, reakciuloj), popolanoj, radikalaj popolanoj, naciaj laboristoj jen estas la ĉefaj partioj. Pri ilia relativa forto kaj sinteno en la nuna parlamento mi intencas skribi poste.

K. D. (Warszawa)

## VIZIO

Unua ĉapitro el "La Fajro" de Henri Barbusse, libro pli ol tri centmilkzemplere vendata kaj kiu mondfamigis ĝian aŭtoron. El la franca tradukis *Marc Elbo*.

Dento suda, Pinto Verda kaj Monto Blanka donas vidon al la palegaj vizaĝoj ekaperantaj el la litkovriloj en rekta vico sur la galerio de la kuracejo.

Ĉe la unua etaĝo de l'hospitalo-palaco, tiu teraso kun balkono el ligno artetranĉita, ŝirmata de verando, estas izolita en la spaco, kaj superstaras la mondon.

La kovriloj el delikata lano — ruĝaj, verdaj, pale kaŝtanaj aŭ blankaj — el kiuj eliĝas vizaĝoj subtilaj okulradiaj — estas kvietaj. Silento regas sur la kuŝoseĝoj. Iu tuis. Poste, oni plu nur aŭdas dise kaj malofte la bruon de la paĝoj de libro, turnitaj laŭ regulaj intertempoj, aŭ la murmuron de demando kaj de respondo diskreta, de najbaro al najbaro, aŭ iafoje ĉe la balustrado, la tumulton kvazaŭ ventumilan de korniko aŭdaca preterfluginta de la bandoj, kiuj en la diafana senlimaĵo, ŝajnigas rozariojn el perloj nigraj.

Silento estas leĝo. Cetere, tiuj, riĉaj, sendependaj, kiuj venis ĉi-tien el ĉiuj punktoj de la tero, trafataj de la sama

malfeliĉo, perdis la kutimon paroli. Ili meditas en si mem, kaj pensas pri sia vivo kaj pri sia morto.

Servistino ekaperas sur la galerio, ŝi marŝas zorge kaj estas blanke vestita. Ŝi alportas gazetojn ilin disdonas.

— Estas efektivaĵo, diris tiu la unua, kiu disfaldis sian ĵurnalon, la milito estas proklamita.

Kiel ajn atendita, la novaĵo kaŭzas ian ekblindigon, ĉar la ĉeestantoj estas influataj de ĝiaj supermezuraj proporcioj.

Tiuj homoj inteleligentaj kaj kleraj, profundigitaj de sufero kaj pripensemo, indiferentaj al ekzistaĵoj kaj preskaŭ al vivo, tiel malproksimaj de la cetero homara, kvazaŭ ili jam estus la posteularo, rigardas malproksimen, antaŭ ili, al la lando nekomprenebla de la vivantoj kaj de la frenezuloj.

— Ĝi estas krimo, kiun faras Aŭstrio, diris Aŭstrianon.

— Estas necese, ke Franclando venku, diris Anglon.

— Mi esperas, ke Germanlando estos venkita, diris Germanon.

\* \* \*

Ili reoportuniĝas sub la kovriloj, sur la kuseno, antaŭ al la suproj kaj la ĉielo. Sed malgraŭ la diafaneco de la spaco, la silento estas plena je la revelaĵo ĵus anoncita.

— La milito!

Kelkaj el tiuj, kiuj kuŝas tie, rompas la silenton, kaj ripetas duonvoĉe tiujn vortojn, kaj pripensas, ke ĝi estas la plej grava okazaĵo de la nunaj tempoj kaj eble de ĉiuj tempoj.

Kaj eĉ, tiu anonco naskas sur la purklara pejzaĝo kiujn ili fikse rigardas, kvazaŭ konfuzan kaj malluman iluziaĵon.

La kvietaj vastaĵoj en la valo ornamita per vilaĝoj rozaj kiel rozoj kaj per velurecaj paŝtejoj, la luksebelaj makuloj de la montoj, la nigra pinto de l'abioj kaj la blanka pinto de l'eternaj neĝoj sin plenigas per homara movaĵo.

Multegoj svarmas laŭ distingaj amasoj. Sur kampoj, ekataĵoj, ondon post ondo disvastiĝas, poste senmoviĝas, domoj estas krevitaj kvazaŭ homoj, kaj urboj kvazaŭ domoj, vilaĝoj aperas en disaj blankaĵoj, kvazaŭ ili estus falintaj de ĉielo teren, ŝarĝaĵoj el mortintoj kaj vunditoj terurigaj ŝanĝas la formon de l'ebenaĵoj.

Oni vidas ĉiun nacion, kies limo estas konsumata de buĉadoj, kiu ŝiras el sia koro senĉese novajn soldatojn fortopleajn kaj sangopleajn; oni longe rigardadas tiujn alfluojn vivajn de morta rivero.

Norde, sude, okcidente estas bataloj ĉiufanke en la distanco. Oni povas sin turni al direkto aŭ alia de la spaco: ne estas eĉ unu, ĉe kies finiĝo la milito malestas.

Unu el la palaj viziuloj, sin levante per sia kubuto, nomadas kaj nombras la militantojn aktualajn kaj estontajn: tridek milionojn da soldatoj. Alia balbutas kun okuloj plenaj je mortigadoj: — Du armeoj interbatalantaj, tio estas unu granda armeo sin mem mortiganta.

— Oni ne estus devinta, diris la profunda kaj tomba voĉo de l'unua de la vico. Sed alia diris:

— Ĝi estas la Revolucio franca, kiu rekomenciĝas.

— Atentu la tronoj! anoncis la murmuro de alia.

La tria aldiris: — Ĝi estas eble la superega lasta milito.

Estas silento, poste skuigās kelkaj fruntoj ankoraŭ paligitaj de la naŭza tragedio de la nokto kiam ŝvitas la sendormo.

— Haltigi la militojn! Ĉu eble! Haltigi la militojn! La vundo de la mondo estas neresanigebla.

Iu tudas. Poste, la kvieto vastega ĉe la suno de la luksegaj herbejoj, kie brilas milde la glazuraj bovinoj, kaj la nigraj arbaretoj, kaj la verdaj kampoj kaj la bluaj malproksimajoj superkovras tiun vizion, estingas la rebrilon de la fajro en kiu brulegas kaj sin frakasas la malnova mondo. La silento senlima forviŝas la murmuregon de malamo kaj sufero de la nigra ŝvarmado universa. La parolantoj unu post la alia reenpensiĝas, absorbitaj de la mistero de siaj pulmoj, de la savo de siaj korpoj.

Sed kiam la vespero prepariĝas en la valo, uragano eksplodas super la Montaro Blanka.

Estas malpermesite eliri dum tiu danĝera vespero en kiu oni sentas, ke ĝisvenas sub la vaŝta verando — ĝis la haveno, kie ili rifuĝis — la lastaj ondoj de la vento.

Tiuj gravaj vunditoj, kiujn kavigas interna vundo ĉirkaŭrigardas tiun renversegon de la elementegoj. Ili rigardas sur la monton eksplodi la fulmotondroj, kiuj levas la horizontajn nubojn kiel maron, kaj el kiu ĉiu ĵetas en la krepusko kune kolonon el fajro kaj kolonon el nubego, kaj ili movas siajn vizaĝojn palegajn kun senhaŭtaj vangoj por rigarde sekvi la aglojn, kiu faras rondojn en la ĉielo kaj kiuj rigardas la teron de supre tra la nebulaj arkaĵoj.

— Haltigi la militon! ili diras. Haltigi la ŝtormojn!

Sed la rigardadantoj lokitaj ĉe la sojlo de la mondo, lavitaj el la pasioj de l'partioj, liberigitaj el la lernitaj ekonoj, el la blindigoj, el la premado de la tradicioj spertas konfuze la simplecon de l'aferoj kaj la eblaĵojn larĝe malfermitajn...

Tiu, kiu estas ĉe la ekstremaĵo de la vico, ekkrias:

- Oni vidas, malsupre, estaĵojn, kiuj rampas.
- Jes... ili estas kvazaŭ vivantaj estaĵoj.
- laj kreskaĵoj...
- laj homoj.

Jen en la malbonsignaj lumetoj de l'uragano, malsupre de la nigraj disflugantaj nuboj, longigitaj kaj disetenditaj sur la tero kvazaŭ malbonaj anĝeloj, ŝajnas al ili, ke ili vidas etendiĝi vasta blupalega ebenejo. En ilia vizio, formoj eliĝas el la ebenejo farita el koto kaj el akvo, kaj sin krampas al la supraĵo de la tero, blindigitaj kaj subpremitaj de kotego, kvazaŭ monstraj ŝipdronuloj. Kaj al ili ŝajnas, ke tiuj estas soldatoj. La ebenejo surfluigita, striita de longaj paralelaj kanaloj, fosita de akvotruoj, estas senlima; kaj tiuj ŝipdronuloj, kiuj provas elterigi sin el ĝi, estas multego... Sed la tridek milionoj da sklavoj, ĵetitaj unuj kontraŭ la aliaj de krimo kaj eraro en la milito de la koto, starigas siajn homajn vizaĝojn en kiuj fine ĝermas iu volo. La estonto estas en la manoj de la sklavoj, kaj oni vidas ja, ke la malnova mondo estos ŝangata de la ligo, kiun iam estiĝos inter si tiuj, kies nombro kaj mizero estas senlimaj.

*La salajreco estas la moderna sistemo de sklaveco.*

## Griza sorto

de ALEKSY RZEWSKI

Malluma nokto kovris per mortotuko tutan ĉirkaŭaĵon. Luno kaŝis sin post la pezajn plumbajn nubojn... Mallumo elrampis sur la vojon, kuŝiĝis en fantaziajn formojn, rompiĝis ĉiumomente, jen ree malaperadis... Vagonaro de elektra apudurba fervojo, resonante kaj bruante, ŝoviĝis sur la reloj sufiĉe rapide. Du elektraj lanternoj de la vagonaro brilis en mallumo kvazaŭ okulaĉoj de iu monstro.

Motoristo gvidanta la vagonaron, tenante per unu mano turnilon de elektra reguligilo, per la dua haltigilon, streĉis la rigardon en la mallumaĵon, penante ion ekvidi. Vane. La konusforma ombro de la vagonaro disfluigis en la traveturejoj, kuŝiĝis trae de la relvojo, aŭ trompadis kaj timigadis la okulojn. Aŭ eble drinkulo vagas nokte inter la reloj? Pro tiaj pensoj kaj supozoj la motoriston trakturadis tremo de piedoj ĝis kapo, kaj kune kun la ritmo de lia propra sango bategis en la brusto, kiel per martelo, la timigita koro.

Tre ofte li interrompatis la elektran fluon, streĉadis siajn fortojn por haltigi la vagonaron, sed plejparte montriĝis, ke ĝi estis flagrado de elektra lumo aŭ nur iluzio. Tiam ordinare, ekkaptita per kolerego, li malbenis varmege, kaj stariginte la reguligilon sur la naŭon, li veturis kun plena rapideco.

La motoristo veturante rapidis; ĉar intervoje estis lin haltiginta dum dekelke da minutoj ŝarĝita per ligno veturilo, en kiu rompiĝis la akso sur la traveturejo; kaj jen oni nepre devas alveni je difinita tempo al la fina stacio, ĉar aliokaze atendas lin raporto aŭ longa senkulpiĝo en la stacio.

De malproksime, nenion antaŭsentante, veturis «kavalire» iom ebrigitita dum la foiro vilaĝano. Kelkajn paŝojn antaŭ la vagonaro li subite turniĝis al sia bieneto, kuŝanta tre proksime apud la fervojo.

Li faris ĝin tiel malbonsance, ke la veturilo fortege ekŝanceliĝis kaj falis flanken sur la traveturejon, eljetante en la foson la malfeliĉan veturigiston. La tramvagonaro kun bruo alproksimiĝadis fulmorapide al la loko de la akcidento. Ĉiam pli kaj pli proksime.

La motoristo, nenion atendente, subite en kelkpaŝa distanco rimarkis kuŝantan sur la relvojo vilaĝanan veturilon. Sub impreso de danĝero sango alfluis al lia kapo. Li komencis per unu kaj alia haltigilo haltigi la vagonaron. Vane, ĉar la rapide kuranta vagono ekpuŝis per tuta forto la veturilon kaj disrompis ĝin en malgrandajn pecetojn.

Eksonis bruo de rompataj vitroj de la vagono, krako de frakasataj fenestrokadroj kaj obtuza ekbato de kurbigita bufro kaj vagonkesto.

Post momento la loko de la akcidento aspektis kiel batalejo, sternita de la restaĵoj de frakasita veturilo kaj vagono. La ĉevaloj de la vilaĝana veturilo en panika timo forŝiris la timonon, kaj blekante laŭte, forkuris en la neĝkovritajn kampojn.

La vilaĝano, nenion sciante, ronkis per dormo de justulo en la foson...

Alveturinte en la vagonejon kun disrompita vagono, plena de zorgo kaj malkvieto, apogante la kapon sur la



laborlacajn manojn, skribis la motoristo raporton al fervoj-direktoro.

“En hodiaŭa tago, veturante per vagonaro n-ro 1-a je la 11.30 horo en 28a kurso, mi surveturis per vagono kuŝantan sur traveturejo veturilon, sekve de kio okazis jenaj difektoj de la vagonaro . . . . k.t.p.”

Ĉu oni kredos je mia senkulpeco? li ekpensis kun apatio. Ja la gazetaro, publiko kaj estroj ĉiam faras la maŝiniston responda pri la akcidento.

Sekvantan tagon staciestro sciigis la oficistaron, ke la motoristo D. pro difekto de vagono estis suspensita (1) en sia ofico ĝis decido de la direktoro, kiu post kelkaj tagoj ordonis al li pagi por la difekto.

Simpla historieto. Ĉu ne vere? Eble eĉ tro simpla por ĝin rakonti al vi, legantoj. Ĉar per kio povas iun interesi la fakto, ke mallaŭdite kaj insultite, eliris la motoristo el la kabineto de direktoro? ke el sia tro modesta salajro li estas pagonta grandegajn kompare kun lia buĝeto kostojn de riparo de vagono? Kiun ĉi tio interesas? Ke en iu bolos la koro pro la eksento de maljusteco kaj ofendo, kaj sub la malhelgriza tramista uniformo bruegos ventegoj de ribelo kaj profunde eksentita insulto.

Jes, legantoj, mi volis al vi rememorigi, pri kio oni ofte forgesas: kiam la bolanta fluo de vivo ĵetos vin en la proksimecon de tiu ĉi tramista uniformo, ne forgesu en distriga bruo de viaj propraj interesoj kaj pensoj, ke apud vi staras ne laboristo-aŭtomato, sed viva sentema homo, kiu kun tia interna doloro akceptos la tro oftajn okazojn de malŝato de lia propra indeco kaj valoro.

El la pola Tradukis K. Domosl.

*Noto de la tradukinto:* La aŭtoro de ĉi tiu noveleto, A. Rzewski, estas unu el la plej konataj ĉefoj de la pola proletariaro. Kiel junulo li jam aliĝis la vicojn de *pola soc. Partio*, suferis multfoje persekutadon, malliberejon kaj ekzilon. Estinta laboristo, per propra laboro li akiris sciojn. En la sama urbo, kie li iam, kiel infano, komencis labori en fabriko — la laborista centro Lodz — nun en 1919j. li estis elektita urbestro.

(1) Tempa eksigo — Red.

## Patriotismo

Mi estis devigata jam kelkfoje eldiri la penson pri tio, ke patriotismo en nia tempo estas sento nenatura, ne prudenta, malutila, kaŭzanta la pliparton de tiuj mizeroj, je kiuj suferas la homaro, kaj ke tiu sento ne devas esti edukata, kiel oni faras nun. — sed kontraŭe, subpremata kaj detruata per ĉiuj de prudentaj homoj dependantaj rimedoj. Kaj mirinda afero, malgraŭ la nedispotebla kaj evidenta dependeco nur de tiu sento de elĉerpantaj la popolon ĝeneralaj armigoj kaj pereigaj militoj; ĉiuj miaj pruvoj pri la malantaŭresto, nekonveneco al la tempo kaj malutilo de patriotismo, renkontiĝis kaj ĝis nun estas renkontataj aŭ per silento aŭ per intenca nekompreneo aŭ ĉiam ankoraŭ per unu kaj tiu sama stranga rediro: oni diras, ke malutila estas nur malbona patriotismo, ĝingvismo, ŝovinismo, kaj ke la vera bona patriotismo estas tre alta morala sento, kiun kondamni estas ne nur neprudente sed eĉ krime kaj pri tio, el kio konsistas tiu vera bona patriotismo, oni aŭ tute ne parolas aŭ anstataŭ klarigi oni elparolas emfazajn frazojn aŭ sub la kompreno de patriotismo oni sub-

starigas ion, kio havas nenion komunan kun tiu patriotismo, kiun ĉiuj ni konas, kaj de kiu ni ĉiuj tiel terure suferas.

Ĝenerale oni diras, ke la vera bona patriotismo konsistas en tio, ke oni volas por sia popolo aŭ ŝtato la verajn bonojn, tiajn bonojn, kiuj ne malutilas al la bono de aliaj popoloj.

Dum lastaj tagoj, parolante kun anglo pri nuna milito, mi diris al li, ke la vera kaŭzo de tiu milito estas ne iaj profitemaj celoj, kiel oni kutime diras, sed patriotismo, kiel tio estas videbla el la konduto de tuta angla societo. La anglo ne konsentis kun mi kaj diris, ke se tio eble estas ĝusta, tio devenis de tio, ke la patriotismo, kiu nun entuziasmigas anglojn estas malbona patriotismo; la bona patriotismo — tiu, kiun li havas — konsistas en tio, ke la angloj, liaj samlandanoj, ne agu malbone.

— “Ĉu vi volas, ke nur angloj ne agu malbone!” demandis mi.

— “Mi deziras tion al ĉiuj!” respondis li, per tiu respondo klare montrante, ke la ecoj de veraj bonoj. — ĉu tiuj bonoj estus moralaj, sciencaj aŭ eĉ praktikaj, — laŭ sia esenco estas tiaj, ke ili disvastiĝos sur ĉiujn homojn kaj sekve la deziro de tiuj bonoj al kiu ajn ne nur estas patriotismo, sed eligas ĝin.

Egale ne estas patriotismo la apartaĵoj de ĉiu popolo, kiujn la defendantoj de patriotismo subŝovas sub tiun komprenon. Ili diras, ke la apartaĵoj de ĉiu popolo estas la nepra kondiĉo por progresado de homaro kaj tial la patriotismo, penadanta konservi tiujn apartaĵojn, estas bona kaj utila sento. Sed ĉu ne estas evidente, ke se iam tiuj apartaĵoj de ĉiu popolo, moroj, kredoj, lingvo estis nepra kondiĉo por vivo de homaro, en nuna tempo tiuj samaj apartaĵoj estas la ĉefa malhelpaĵo por efektivigo de la de homoj komprenata idealo — frateca unuiĝo de popoloj, kaj tial la konservo kaj defendo de apartaĵoj de kia ajn, — rusa, germana, franca anglosaksa, elvokante la saman konservadon kaj defendadon de hungara, pola, irlandia nacieco kaj eĉ de baska, provençal, mordva, ĉuvaŝa kaj de multegaj aliaj nacioj. — servas ne al la unuiĝo de homoj, sed al ĉiam pli granda ilia fremdiĝo kaj dividiĝo.

Sekve la vera kaj ne imagita patriotismo estas tiu, kiun ĉiuj ni konas, sub kies influo estas pliparto de nuntempaj homoj kaj de kiu tiel terure suferas la homaro — tiu patriotismo ne estas deziro de spiritaĵoj al sia popolo (deziri la spiritaĵojn nur por sia popolo oni ne povas), kaj ne apartaĵoj de popoloj individualecaj (tio estas eco, sed neniel sento), sed estas tre difinita sento preferi sian popolon aŭ ŝtaton kompare kun aliaj popoloj aŭ ŝtatoj, kaj tial estas la deziro por tiu popolo aŭ ŝtato je plej granda bonstato kaj potenco, kiuj povas esti akirataj kaj ĉiam estas akirataj per malutilo je bonstato kaj potenco de aliaj popoloj kaj ŝtatoj.

Ŝajnus do evidente, ke patriotismo kiel sento estas sento malbona kaj malutila, kiel doktrino estas doktrino malsaĝa, ĉar estas klare, ke se ĉiu popolo kaj ŝtato rigardos sin kiel plej bonan el ĉiuj popoloj kaj regnoj, tiam ĉiu el ili estos en maldelikata kaj malutila eraro.

Leo Tolstoj  
El “Tri verkoj de Tolstoj”



## La Angulo de l' Poetoj

### HUNGARO EN SIBERIO

Ĉu vi min atendis  
— Amatino kara —  
Kiam ruĝa festo  
Proletariara  
Triumfegis hejme  
En la tuta lando  
Super putra nesto  
De la burĝa bando?

Vane vi atendis:  
Dunga rabistaro  
De la blanka Kolĉak  
Estis sanga baro!

Ĉu vi min atendas  
— Amatino kara —,  
Al la trikolora  
Flago, la hungara,  
Kies tukon svingas  
Laborista ĝemo,  
Kies vanta flirto  
Vokas al venĝemo?

Vane vi atendas;  
Landon de libero  
Mi ne interŝanĝus  
Eĉ por tuta tero!

Ĉu vi min atendos  
— Amatino kara —;  
Kiam proksimiĝos  
Muĝe ondo mara,  
Liberiga trupo  
Pasos tra la limo,  
Savon alportanta  
Fine al viktimo?

Tiam min atendu:  
Sed memoru bone,  
Ke decidan venkon  
Helpu vi duone!

June.

El "Esperanta Movado" Kronstad (Rusio) 1921



### LA INTERNACIO

1.

Stariĝu sklavoĵ pro malsato,  
Damnitaj jam sur la Tero.  
Racio pli kaj pli fortiĝas,  
Ĝi regados la tutan mondon;  
De l' pasinto nenio restu!  
Ho! servuloj ni staru! staru!  
La bazo de l' mondo ŝanĝiĝos,  
Ni el nenio iĝu ĉio!

2.

Cezaro, Dio, parolulo,  
Neniu estas la savonto.  
Ni savu nin mem laboristoj!  
Ni decidu l' komunan bonon!  
Por forigi la ŝtelegadon,  
Liberigi la spiritaron,  
Necese estas fidi nure  
L' agadon de l' laboristaro.

3.

Nin premas Ŝtato, trompas leĝo;  
L' imposto nin plimizigerigas;  
Neniu devo por riĉulo,  
Nek rajteto por mizerulo.  
La leĝaro de l' Egaleco  
Estos vere alia tute:  
Ekzistos ne rajto sen devo,  
Nek iu devo sen rajturo.

4.

Ho! reĝoj de la fervojaro!  
Kaj vi, ho! reĝoj de la minoj!  
Ĉu faras vi alian agon  
Ol senigi laboristaron?  
La popolo kreadis ĉion,  
Kio estas riĉaĵo via;  
Trudante, ke vi ĝin redonu,  
Ĝi volas nur proprajn sian.

5.

La paco estu inter ni mem!  
Batalu ni la tiranecon!  
Ni uzu strikon en armeoj,  
Kaj rifuzu militi plue.  
Kanibaloj! se vi persistos  
Fari el ni heroojn novajn,  
Vi vidos, ke la kugloj trafos  
Al niaj propraj generaloj.

6.

Partio de la laboristoj  
De l' urboj kaj de la vilaĝoj,  
La Tero al ni apartenas.  
Paraziĝ! Aliloken iru!  
Vi vin nutras per nia karno,  
Ho! vi korvoĵ, ho! vi vulturoĵ!  
Sed fine, ja vi malaperos  
Kaj bela suno ĉiam brilos.



## La Internacio

Paroloj de  
E. Pottier

Muziko de  
Degeyter

Esperantigis:

La Pariza laborista esperantista grupo

*♩ = 96 (Malrapida Marŝo)*

Star - iĝ - u, sklav - oj pro mal -  
 - sat o, Dam - n - it - aj, jam nun sur la Ter - o Ra -  
 - ci - o pli kaj pli fort - iĝ - as, Ĝi reg - ad - os la tut - an  
 mond - on De l'pas - in - to ne - ni - o rest - u! Ho! serv -  
 - ul - oj! ni star - u! star - u! La baz - o de l'mondo ŝanĝ -  
 - iĝ - os! Ni, el ne - ni - o, iĝ - u ĉi - o! Jen la  
 fin - a bat - al - o! Ni grup - iĝ - u, kaj bald - au La  
 In - ter - na - ci - o En - hav - os la Hom - ar - on! Jen la  
 fin - a ba - tal - o! Ni grup - iĝ - u, kaj bald - au La  
 In - ter - na - ci - o en - hav - ad - os Tut - an la Hom - ar - on!

### REKANTAĴO

Jen la fina batalo!  
 Ni grupiĝu kaj baldaŭ  
 La Internacio  
 Enhavos la Homaron!  
 Jen la fina batalo!  
 Ni grupiĝu kaj baldaŭ  
 La Internacio  
 Enhavados tutan la Homaron!



## Letero el Finnlando

Tie-ĉi oni vivas sub blanka teruro, kiu premegeas la komunistajn laboristojn. Niajn plej bonajn kamaradojn oni enkarcerigas. Nin ĉiujn ĉirkaŭiras grandrombraj policianoj, kiuj persekutas kun la intenco nin malliberigi. La burĝaro opinias, ke nia idealo povas esti forneniigata per la teruro. Erare. Male, ni, finnaj komunistoj, ricevas instigon de tia malnobla kaj sovaĝa premegego. Ni estas pleje konvinkitaj, ke post nelonge venkos la laboristaro tutmonda.

Nia burĝaro malsaniĝis je naciismo, je "Grand-Finnlandeco". Tiu malsano kondukis ĝin en Karélion kontraŭ niajn rusajn kamaradojn. Sed la glora entrepreno ne sukcesis: La t. n. liberbatalistoj (naciistoj) revenis hejmen en tre malbona stato, kvazaŭ batitaj hundoj tenantaj la voston inter la piedoj.

La tuta forkurantaro konsistas proksimume el 35 000 personoj, el kiuj 10 000 Kareloj. Tial ke en Finnlando jam regas senlaboreco, tio plimalbonigas la situacion nian.

Pli kaj pli la laboristoj konvinkiĝas ke nur tutmonda revolucio povos solvi la nuntempajn problemojn, ĉu ili estu ekonomiaj aŭ politikaj.

S. A. T. ano.

## El la Redaktejo

Responde al kelkaj demandoj mi enmetas la jenajn klarigojn, kiuj povas ankaŭ interesi nedemandintojn:

*Pri la sufikso end:* Ĝi signifas: kio *devas* esti... ata, sed eble ne estas... ota. Ekzemple: Via propono estas tre subteninda kaj subtenenda, tamen, estu certa ke ĝi estas nesubtenota.

*Pri la prefikso mis:* Ĝi signifas proksimume: ne tute ĝuste, erare, fuŝe, maltrafe... i. Ekzemple: Via muzikinstrumento estas certe *misagordita*, ĉar neagrable ĝi sonas.

*Pri akuzativo en iaj kazoj:* Intence mi ne uzas akuzativon en frazoj kiel la jenaj: Enkonduki esperanton en la lernejoj(n). Ne povas en tia frazo esti, pro manko de akuzativo, iu ajn duba malprecizeco.

Pri datoj ankaŭ ofte mi forlasas *intence* la akuzativon. Mia ĉefa konduktregulo estas zorgi nur pri klareco, pri forigo de ĉiu dusenceco ktp. Cetere se okaze, mi grave pekas kontraŭ la gramatikaj reguloj, oni ne miru: mi eĉ ne posedas "ateston pri lernado"!...  
 E. L.

### ATENTIGO

Niaj korespondantoj estas insiste petataj teksti ĉiun mensemendon je la nomo de L. Glodeau, 177 rue de Bagnolet, Paris (XX) Poŝta Konto 26132 — tio ŝparcele. Ekz.: ni ricevis el Germanio poŝtmandaton da 35 Mg., kiu valoras 1,75 fr. Por tiu sumeto ni devis kvitanco pagi 0,25 fr. — La Adm.

## Policanaro pri Esperanto

Nuntempe oni bruadas pri oficiala akcepto de esp.o en la servo de *Dresdena polico*, ke oni starigis apartan oficejon aplikante esp.on por celoj policaj, k.t.p. Certe nia kamaradaro ankaŭ interesiĝos pri kelkaj heroaj postmilitaj de la Dr. policanaro. Kvankam ne aktualaj, iliaj faraĵoj estas menciindaj kaj neforigeblaj estas nigraj makuloj.

En Dreseno, dum 1920, estis striko de bankoficistoj; la unua de tiu ĉi kategorio de oficistoj. Ĝi iam estis unu el la plej malalte salajrita el ĉiuj kategorioj. Ĉu estis mirinde, ke tiuj ĉi subpremitoj rifuzis labori por per batalo plibonigi sian vivtenadon? La batalo estis akra kaj de tago al tago ĝi pliakriĝis. Kontraŭ la ĝistiutempaj obeemuloj staris la plej potenca grupo kapitalista, kiu provis ĉion por malsukcesigi la strikon, sed vane. Fine oni provis lastan rimedon: instigo al la Saksa registaro disponigi la policon.

La registaro plenumis la deziron de la bankkapitalistoj. Iutage matene ĉiuj bankejoj estis okupitaj de armitaj policianoj verdaj. Ĉi tie ekzistas nigre, verde k.t.p. vestitaj policianoj. En la bankdomojn estis portitaj maŝinpaŝiloj. Tiu ĉi hontajo celis gardi la strikrompantojn, por ke ili eniru bankejojn ne-malhelpite de la strikantoj.

\* \* \*

Pasintan aŭtunon, okaze de la disigo de Supersilezio, en Dresdeno estis aranĝita kunveno. Ĝi celis protesti kontraŭ la forrabo el parto Supersilezia de la "Entente". Ĉiuj kontraŭuloj kaj patrolandamantoj estis publike invitataj. La ĉambrego estis plenigita sufiĉe: en ĝi estis diversaj partianoj. Iu proletario vendisto de revuoj ne preterlasis okazon por vende rekomendi revuojn revoluciecajn antaŭ la komencigo de la kunveno. Li vendis, vendis... sed baldaŭ li estis malhelpata kaj elirigata. Tamen la superpatriotoj kaj Hokkruanoj — Orgeŝanoj — rigardis kun bedaŭro, ke diversaj ĉeestantoj legis tiujn ĉi danĝerigajn revuojn. Unu el la gvidantoj de la kunveno laŭte konigis: „Oni forprenu aŭ disŝiru ilin. Kelkiuj ilin enpoŝigis pro timo esti atakataj.

Inter la ĝeĉeestantoj ankaŭ estis Sinjorino Dro. Stegemann, membro de dekstre socialista partio, anino de la urba konsilantaro. Ŝi ne atentis la konigitan postulon kaj legis pluen. Sed baldaŭ ŝi estis ĉirkaŭata de aro da Hokkruanoj, fijunuloj k.t.p., kiuj insultante, ofendante, minacante postulis forprenon de la koncerna revuo. Unu el la bubaĉoj eĉ ĝin klopodis ekkapti kaj disŝiri. Fine la sinjorino decide preferis forkuri, por ne plu esti atakata. Malfeliĉe ŝi erarante venis en apudĉambron, kiu estis plena de policianoj. Ili tie estis postenitaj pro eventualaj okazontajoj. Anstataŭ helpi al la senarma sinjorino pacema, oni alkriis kaj ofendis ŝin tiamaniere, ke oni publike en la gazetaro raportis pri skandalo. Oni certe estus daŭrigonta la malbontraktadon de tiu ĉi senhelpa sinjorino, se ŝi ne estus prezentinta sin kiel aninon de urba konsilantaro, Drino Stegemann. Surprizite kaj embarasite la sinjor' policianoj senkulpigis sin kaj riverencis kurbigante la dorsojn kiel kato. Oni petis ŝin reiri la ĉambregon kaj unu el la herooj sin prezentis kiel gardanto. — Kara leganto imagu, kion oni farus al ino, kiu malfeliĉe ne estus anino de la urbkonsilantaro kaj ne posedus dokortitolon, se ŝi estus nur simpla, mortigebla laboristino! Multajn similajn heroojn mi povus priraporti, sed la supraj sufiĉe pruvus, ke la policanaro nur estas ilo en la manoj de kapitalistoj.

Tiom longe estos tiel, ni ne havas iun ajn profiton progresigi esp.on inter la policianoj, nek iun kaŭzon por ĝoji pri ĝia progreso meze tiuj ĉi gardistoj de la kapitalismo, kvankam arego da policianoj devenas el la klaso neposeda. Male ni eĉ timu la progreson de nia lingvo inter obeemaj iloj en kapitalistaj manoj.

Pripensu gekamaradoj. Kiam iuj el ni, pro agoj revoluciaj estos devigataj forlasi nian landon por ne esti ekkaptataj de la Blankuloj aŭ ne dum "forkuro" esti mortpafita ili certe interkomprenigante per esp.o kuros en la maŝaron de la Internacia Serĉad-policanaro.

Tiu ja aplikas nian lingvon por pli facile ekkapti viktimojn. Oni ja diras krimulojn, sed laŭ vidpunkto de kapitalisto ja ĉiu komunisto, ĉiu revoluciulo de la neposeda klaso estas "krimulo". Tial ne malŝparu iun eron da energio por akceli esp.on ĉe la policianoj, kiel faras senkonscie k'oj, pagante kotizon al neŭtralaj organizaĵoj. —

La patriolo estas la lando, kie oni ne estas subpremata kaj kie oni uzas la kompletan produkton el sia laboro. ALBERT MATHIEZ.

## DIVERSAĴOJ

### Alvoko al la Gekamaradaro (1)

Kiaj devas esti la taskoj de revoluciemaj Esperantistoj en Esperantio? Ni opinias jene: Kontraŭbatali la burĝajn Esp-istojn, kiuj per nia lingvo predikas patriotismon, religion, interklasan kunlaboradon, unuvorte trompon por la Proletariaro. Ni devas malpermesi, ke, pretekse neŭtralismon, la burĝoj ne infektu la ĉerbojn de niaj samklasanoj per siaj trompallogaĵoj. Jam ni povas konstati ĝermon de tiu malsano ĉe multaj kamaradoj, kiuj forgesas pri klaskoncio kiam ili agas en Esperantio...

Ĉar ni konsideras, ke *Lingvo Internacia* havas plej grandan signifon por la klasbatalo, ni devas klopodadi por ke ĉiuj *Mondlingvanoj* (2) interkonsentu por definitive triumfigi la ideon pri L.I. en niaj revoluciemaj rondoj. La revoluciemaj Mondlingvanoj devas ĉiuj kune kaj konkorde studi, kiaj estas la plej trafaj rimedoj por trudi L.I-an al la Revoluciularo.

Ĉiujn liberpensantajn samcelanojn ni alvokas al kunlaborado.

*Szilagy kaj Manske*

Ĉiun respondon oni tekstu jene: *Berlin, Schmargendorf, Breite Strasse 4. Sz. Manske.*

### Pri "novaj tempoj"

Amika respondo al amika demando

Mi neniam provis aperigi artikolojn pri profesiaj teknikaj temoj ĉar, kiel estas skribita en "nonaj tempoj" «Mi komprenas, ke aliaj gazetoj — eĉ simpatiaj kaj simpatiantaj kiel *Sennacieca Revuo* — ne povas pritrakti profesiajn kaj teknikajn aferojn» Estas en tiu frazo nenia riproĉo, sed nur opinio. Miaflanke, mi eble povas demandi S. R-on ĉu ĝi provis havigi al si la deziritajn artikolojn pri pedagogiaj temoj?

Erareton mi trovas en la recenzaĵo: la kvarpaĝa n° pri kiu vi parolis estas speciala n° kaj ne la unua n°, kiu estas 12 paĝa.

*Tutamike E. Vittecoq*

Respondo: Mi tute malintencas polemiki kun K<sup>do</sup> V. La legantoj de "n. t." juĝu mem ĉu la enhavo de la I<sup>a</sup> n° estas vere tiel teknikeca, ke ĝi ne povus trovi lokon en S. R. Ni opinias ke *jes* — kaj daŭrigas pensi, ke la diseco de la penoj estas malbona por nia movado. — E. L.

## Esperantistoj aliĝu

Al la I<sup>a</sup> Kongreso de *Internacia Federacio de la Arto, Beletristiko kaj Scienco* kiu okazos ĉimonate en *Bruxelles* de la 17<sup>a</sup> ĝis la 20<sup>a</sup>. En la tagordo estas: Unuecigo de la aŭtoraj rajtoj ktp., esploro pri ĝenerala interhelpo, Lingvo Internacia ktp. Por informoj sin turni al la Sekretario: S<sup>o</sup> *Bauville d'Hostel*, 38 bis rue Fontaine, *Paris*.

(1) En liberema spirito ni resume enpresas tiun alvokon, laŭsante al la subskribintoj la respondecon pri la enhavo. — Red.  
(2) Esp-istoj, Idistoj k. a.



## KRONIKO

## Francio

**Marseille:** Nia intersindikata grupo kaj S.A.T.-sekcieto bone subtenas la esp.-propagandon. Elementa kurso, atente kaj akurate sekvata de studemaj k<sup>doj</sup>, (precipe el la anarkista junularo) okazas ĉiulunde je la 7a vespere, gvidata de k<sup>doj</sup> Angeletti (el la Junularo Anarkista). Supera kurso okazas ĉiuvendrede je la 7a vesp.; ambaŭ kursoj en nia sidejo (Laborborso, ĉambro 15, 1a etaĝo) — La kurslernolibro kompleneble estas nur „nia taŭga proletaria gramatiko“ — Laborista grupo baldaŭ estos fondata en proletaria ĉirkaŭurbo „l'Estaque“ (kie loĝas multaj k<sup>doj</sup> fremdaj precipe hispanoj) dank' al kurso organizita tie — Lastkunsido la grupo fiksis la kotizon ĝis 12fr. poĵare el kies sumo, estas deprenote la kotizojn por S.A.T. kaj por F.E.R. Do devige, ĉiu grupmembro aniĝante nian grupon fariĝas „pro fakto“ samtempe ano de S.A.T. kaj de nia Fed. Rev. — Jen ekzemple sekvinda! — Okaze de trapaso en Marseille de 2 holandaj ciklistoj, ĉirkaŭiranta la mondon, la grupo organizis konferencon en nia sidejo kiu bone sukcesis. Adiaŭa vespermanĝo kunigis 20<sup>on</sup> da Esperantistoj, kiuj faris la eblon por mildigi ilian ne afablan opinionon, por francoj, kiun ĝenerale francaj Esp. trudis al ili — Dank' al laborista esp<sup>aro</sup> la „interna ideo“ kaj tutmonda kamarademeco, en Marseille ne pereos. . .

Sokr. MORENO

## Rusio

**Moskvo:** Fondiĝis *Sovjetlanda Esperanto-Servo*, kies fundamentaj tezoj estas: „Por ke oni povu montri la praktikan celon kaj uzadon de l' internacia lingvo esp.o *Sovjetlanda Esp. Unuigo*, decidis, laŭ akceptita je tia demando (dum 3a Tutruslanda Kongreso, Petrograd, 1921) rezolucio, organizi esperantan servon (S.E.S.).

Por forigi la mankon de iaj ajn interligiloj S.E.S. organizas ĉe grupo, sekcio, klubo aŭ filio de S.E.U. sian reprezentadon per rajtigita konsuldiligito.

Rajtigita konsulo aŭ Delegito de S.E.S. povas esti (en Rusio) nur ano de grupo aŭ izolaliĝinto al S.E.U. kaj (Eksterlande) izolaj Esp.-istoj aŭ anoj de esp.-organizaĵoj starantaj sur la bazo de l' klasbatalo.

S.E.S. estas iuloke reprezentata de Delegitoj laŭ destino de l' Ĉefdelegitoj kaj konsuloj — federaciaj kaj urbaj, elektitaj de niaj kongresoj aŭ grupoj — kiuj, post konfirmo de Ĉefdelegito, fariĝas anoj de l' *Prezidium* de l' loka Federacio aŭ grupo. — Laŭ komuniko de Ĉefdelegito de S.E.S.

A. RADINKOV



## RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

## Libroj

**Kursa Lernolibro laŭ praktika parola metodo de Edmond Privat.** 4<sup>a</sup> eldono (13<sup>a</sup>—17<sup>a</sup> miloj) 1922. Eldonejo: *Esperanto-Verlag*, Berlin S 59. Formato: 11<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 16 cm. 80 pĝ. Prezo: 9 M. ger., por bonvalutaj landoj; 13,50 M. ger.

En la antaŭparolo estas dirite: „Tiu-ĉi kursa lernolibro . . . celas helpi la instruantojn por lernigi la tutan gramatikon de la lingvo preskaŭ ne parolante pri ĝi, sed per konstanta parola uzado de ekzemplaj frazoj aranĝitaj en konversacia maniero“.

Verŝajne la enhavo respondas al la promesoj, ĉar jam disvendigis pli ol 13 milojn de la libreto. Tiu fakto estas plej bona pruvo pri taŭgeco.

Ĉi-tiu 4<sup>a</sup> eldono estas tre plaĉa kaj zorge prilaborita.

Karlo de *Edmond Privat* kun antaŭparolo de *Marie Hankel*. 7<sup>a</sup> eldono (18<sup>a</sup>—22<sup>a</sup> miloj). Eldonejo: sama kiel supre. Formato:

11 × 16 cm. 45 pĝ. Prezo: 5 M. ger., por bonvalutaj landoj; 7,50 M. ger.

Karlo estas rakonto pri vivo kaj edukado de juna burĝo. Oni vidas lin, zorgeme vartita de bona patrino kaj sindonema servistino, eniri la vivon laŭ tute glata maniero. Ĉio estas dolĉa, blua, elportinda en la medio kie kreskas la junulo. Oni sekvas lin en lernejon, preĝejon, liceon ktp. ĝis, fariĝinte kuracisto, li edziniĝas kaj travojaĝas Italion, — kiel decas al ĉiu burĝa paro post edziĝo. Ĉio estas do plej bona en la plej ktp. . .

La romaneto estas nedubeble talente verkita, kaj la libreto tre rekomendinda laŭ stila vidpunkto. La egaj konservemuloj riproĉos la aŭtoron, ke li anstataŭis la vorton „deklino“ kiu troviĝas en la antaŭaj edonoj, per la ida vorto *deklino*. Sed male, ni gratulu pri la ŝanĝo, ĉar tiu vorto estas de ĉiuj komprenebla kaj pli simpla ol la unua.

**Poŝkalendareto por Esperantistoj**, (1922) kompilita de *Karl Minor* kaj eldonita de la sama firmo kiel la du ĉi-supraj verkoj. Formato: 8 × 12 cm. 64 pĝ. Prezo: 3 M. ger., por bonvalutaj landoj 4,50 M. ger.

Tiu libreto enhavas portreton de D<sup>ro</sup> Zamenhof, kalendarajn notojn pri la historio de esp.o, pri esp. organizaĵoj kaj la 16 regulojn de la Fundamenta Gramatiko de esp.o. En la gazeta adresaro ni legas pri *Sennacieca Revuo*: „Red.: E. Lanty, Adr.: 177 rue de Bagnolet“. Tio estas eraro. Espereble la adresoj pri aliaj gazetoj estas pli fidindaj.

**Elementar-Lehrbuch zur gründlichen Erlernung der internationalen Hilfssprache Esperanto** de *Guido Otto*. Vierte, neubearbeitete Auflage (16.—30. Tausend). Formato: 12<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 19 cm. 132 pĝ. Prezo: 12 M. ger., por bonvalutaj landoj 18 M. ger. Eldonejo: oni vidu supre.

**La malbonaj flankoj de Sporto kiel anstataŭaĵo de fizika laboro rilate higienon** de D<sup>ro</sup> *Juhan Vilms*. Tradukis el estona lingvo kaj eldonis *J. Vahtkerl*. Adreso: Luisentali t. 5—11, Tallinn (Estonio). Formato: 14<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 20<sup>1</sup>/<sub>2</sub> cm. 24 pĝ. Prezo nemontrita.

La enhavo de tiu broŝuro estas plej interesa kaj koniginda. Domaĝe ke la tradukinto ne ĉiam korekte uzis nian lingvon. Cetere, konsciente pri tio li lojale avertas la legontojn pri sia nefunda scipoveco de esp.o. Plia bedaŭrindaĵo: preseraroj estas nemalmultaj. Ni deziras, ke tiu unua eldono rapide elĉerpiĝu por ke, en venonta, ĉio malbona koncerne la lingvon kaj presadon estu forigata. — La verko estas mendebla ĉe la librejo de S. R., 177 rue de Bagnolet, Paris (XX).

**The Esperanto Teacher A Simple Course for non.** — *Grammarians by Helen Fruyer*. (Deka eldono.) Eldonejo: *Brita Esp. Asocio*. 17 Hart Sreet, London. W. C. I. Formato: 10<sup>1</sup>/<sub>2</sub> — 16 cm. 172 pĝ. Prezo: 1 ŝ. 2 p. (6 resp.-kup.)

**Rakontoj el la Biblio laŭ la traduko de D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof** (1921). Eldonejo: *Brita Esp. Asocio*. Formato: 10<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 16 cm. 8) pĝ. Prezo: 1 ŝ. 4 p. (7 resp.-kup.)

**Oficiala Raporto di la Unesma Internaciona Kongreso por la Linguo Internaciona Ido.** Sueda Ido-Editerio, 51. Oestermalmgatan, Stockholm. Formato: 14<sup>1</sup>/<sub>2</sub> × 22 cm. 40 pĝ. Prezo nemontrita.

## Muzikaĵoj

**Fideleco kaj Esper.** Poemo de *S. Frantz*, muziko de *F. de Ménéil*. Vendas *Esp. Centra Librejo*, 51 rue de Clichy, Paris. Prezo: 1 franko.

**Himno pri universala paco.** Poemo de *S. Frantz*, muziko de *Vicent F. Bort*. Havebla ĉe *Esp. Centra Librejo*. Prezo: 1 franko.

## Gazetoj

**Litova Stelo** (n<sup>o</sup> 1). Dekdupaĝa gazeto ilustrata, redaktata tute en esp.o laŭ naciema spirito. Formato: 24 × 32 cm. Abonkondiĉoj: diversaj laŭ landoj. Adreso: *J. Mačernis*, Kaunas Ukmereg. pl. 35 (Litovio).

**France-Esperanto** (n<sup>o</sup> 1). Okpaĝa gazeto redaktata en esp.o kaj franca lingvo. Formato: 18 × 25 cm. Abonprezo: 8 franko. Adreso: 51, rue de Clichy, Paris.

**Moderna Edukisto** (n<sup>o</sup> 1). Sespaga, redaktata en esp.o kaj ido. Formato: 25 × 33 cm. Abonprezo: valoro de tri labor-horoj. Adreso: *L. Boxtreu, Fief-Sauvin* par Beaupréau, Maine-et-Loire (Francio).

**Bulletin de la Societé Francaise pour la propagation de l'Esperanto** (n<sup>o</sup> 1). Franclingva kaj kvarpaga kun aldono dupaga en esp.o. Formato: 25 × 33 cm. Diversaj abonkondiĉoj. Adreso: *Rollet de L'Isle*, 35 rue du Sommerard, Paris.

**Katolika Revuo** (n<sup>o</sup> 1). Tridekdupaĝa kajero redaktita tute en esp.o. Formato: 13 × 23 cm. Abonprezoj: diversaj laŭ la landoj. Adreso: Nyírcsászári, Dep. Szatmar (Hungario).

**Der Arbeiter-Esperantist** (n<sup>o</sup> 2, 3). En ĉi-tiuj n<sup>o</sup> estas vigle diskutate pri internacia organizado. K<sup>do</sup> *P. Rauschenbach* resumas la diskutojn en artikolo titolita: *Zur Aufklärung*. Lia argumentado estas modelo pri silogisma diskutado: *Ni nepre bezonas Internacion; S. A. T. ne estas Internacio; do ni starigu alian organizaĵon, Kiom logike kaj... prave!...*

**Memornoto.** — 1. *Gazetoj tute en esp.o.*: Belga Esp.isto (81—82, 83—84), Katolika Mondo (6), Esperanto (1<sup>a</sup> 2), Esp.to Triumfonta (68, 69, 70, 71, 72, 73, 74), Nova Eŭropo (1), Hispana Esp.isto (54), Libero (14), Hungara Esp.isto (1, 2), La Progreso (2), Espero Katolika (125), Verda Utopio (12), Novaj Tempoj (1).

2. *Esp. Gazetoj dulingvaj*: Esperanto Praktiko (1, 2), Arguso (5, 6), Antaŭen (4), Bulgara Esp.isto (5), Marto (1, 2), Kataluna Esp.isto (1, 2), Le Monde Esp.iste (6), Bulletin de la Societé Francaise p. la p. de l'esp.o (2), France-Esp.o (2), Amerika Esp.isto (3) Egipta Esp.isto (2), L'Esperanto (1, 2), The British Esp.ist (203), Germana Esp.isto (1, 2) (Export Esp.ist (1), Ruĝa Esp.isto (2, 3), La Espero (1, 2), Brazila Esp.isto (9—12), La Patrie Ladine (3—5).

3. *Idistaj aŭ mondlingvanaj*: Mondo (1, 2), Suisian Idisto (2, 3), Liberpro (1, 2), L'Amiko Idisto (12), La Fenille (2, 3), Akademio pro Interlingua (1), La Langue internationale (1).

4. *Diversaj*: Gioventu socialista (41), Artikolo pri esp.o de S. Palombi kiu mencias pri S. A. T. (Adreso: Milano-Via Settala, 22), Delnický Denik (30), Tradukajo el S. R.; Svoboda (15) Trad. el S. R.; Postund Telegraphie (6), Artikolo de K. Deübler pri esp.o: Avangardio (7), Ampleksa artikolo pri esp.o de E. C. (Adreso: Roma — Casa del Popolo — tria Capo d'Afrika); Esperantský Zpravodaj (1, 2): Il Fotoincisore (13), Esperanta fako; Norsk Bokbinder-Tidende (2, 4), Esp. fako; Le Sinceriste (2, 3), Esp. fako; Eugenia (11), Esp. fako; La France Postale Esp.iste (3): La Dépêche de l'Aube (380), Hugot-Raison enpresigis leteron en esp.o ricevitan el Rusio; L'Ecole Emancipée (16, 18, 19, 20, 21, 22, 23). Pedagogia revuo ĉiusemajna, enhavas ofte artikolojn pri mondlingvo. Adreso: 15, rue Fardeau, Saumur (M. & L.). — Francio; La Bataille (27, 28, 29, 30, 31, 32, 33), Adreso: 2, rue de l'Hotel-de-Ville, Paris (II); L'Etincelle (15); Bulletin of the Women's international League for Peace and Freedom (Februaro); Erkenntnis und Befreiung (8, 9); La vie d'Outre-Tombe (4, 5); Les Humbles (1, 2); La Rose + Croix (1, 2); Le Mutilé (40, 42); Le Neo-Naturien, Adreso: Chatillon-Sur-Thonet, près Parthenay (Deux Sèvres) Francio; La Femme Socialiste (15); La Muse Rouge, Adreso: 89, rue Charlot, Paris (3); L'Emancipateur (14, 15); La Revue des Primaires (3—4); Les Petits Boushommes (1); Travail (43); Le Réveil de l'Esclave (17, 20); Publications de "La Révolte" et Temps Nouveaux (11), Adreso: Jean Grave, 9, rue Edmond-Abont, Robinson, par Sceaux (Seine); Falstaff (1); "Luxembourg" (1); L'Ordre Naturel (3); Tagblatt (7), Cefartikolo pri mondlingvo, kies aŭtoro estas favora al esp.o. Adreso: Linz (Aŭstrio), Spittelwiese.



## Sennacieca Asocio Tutmonda

23. Rue Boyer, Paris-XX<sup>e</sup>

### OFICIALA INFORMILO

**Celo:** *Utiligi praktike la internacian lingvon Esperanto, por la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda (vidi la statuton).*

**Jarkotizo:** *Laŭ valoro de unuhora salajro meza = Anglio, 17 pencoj; Aŭstrio, 42 kr.; Belgio kaj Francio, 2,50 fr. fr.; Bulgario kaj Rumanio, 8,50 lev.; Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio, 7 kr.; Danio, Norvegio kaj Svedio, 1,70 kr.; Germanio kaj Finnlando, 7 Mk.; Hispanio, 2 pes.; Hungario, 17 kr.; Italio, 3,40 lir.; Nederlando, 0,85 Guld.; Polio, 85 Mk.; Svisio, 1,70 fr. sv.; Usono, 35 cend., k.t.p.*

**Membreco kun jarabono al «Sennacieca Revuo»:** *Multobligu la tarifon de membro per 4. — Ekz.: en Germanio, membro pagas 7 Mkg., abonanto 25 Mkg., membro-abonanto 28 Mkg.*

*(La landoj, kies monkurzo estas malfavora rilate al franca franko, pagu preferate per naciaj monbiletoj, en registritaj leteroj; la aliaj laŭvole).*

\*

La pasinta monato estas ne malpli bona ol la antaŭaj.

K<sup>do</sup> Martin Muribo, Bekkelagkogda, Kristiania (Norv.) varbis 4 novajn anojn. — K<sup>do</sup> Jean Roth (Frankfurt) 4. — K<sup>do</sup> Batta Joz., Sobinovska ulica 23, Prešov (Ĉekoslov.) 7. — En Brest 5 novaj (adr.: k<sup>do</sup> Struillou, poste, Brest, Francio). — En Paris 3, Dresden 2, Leipzig 5, Weisenfels 5 (adr.: k<sup>do</sup> Galle Emile, Leipziger Str. 81 Weissenfels a. Saale, Germ.). — Bruxelles 4 (k<sup>do</sup> Van Aelst, 107 rue Emile Féron, St. Gilles-Bruxelles, Belgio). — Nürnberg 7 (k<sup>do</sup> Gerber Georg, Allersberger Str. 57, II, Nürnberg, Germ.). — Barcelona 9 (k<sup>do</sup> Borrel Jose, Str. Banos Viejos 5.2. Barcelona). — Warszawa 6, Düsseldorf 2, Marseille 7 (k<sup>do</sup> Moreno Marius, 100 rue Ferrari, Marseille). — München 2, Roma 2, Köln 5, Dotnava (Polio), Berlin, Rouen, Lyon, Markranstädt (Germ.), Wien, Pleven (Bulgario), k.t.p.

Ancoraŭ unu peneton. kaj ni ekkomencos la duan milon.

\*

**Pago de la kotizo.** Ni ree atentigas ke la jarlibron ricevos nur la membroj pagintaj la 1922-jaran kotizon, kaj nenial escepto estos cedata.

\*

**Nia jarlibro.** Spite nian penadon kaj volon, tempo al ni mankis por pretigi ĝustatempe la tekston de nia jarlibro; sed tamen, la 15an de marto, nia presisto estos ricevinta la tutan presotajon. Espereble, ni povos dissendi la libron je la lastaj tagoj de aprilo. — Kompreneble la venontaj aliĝoj ne aperos en la adresaro.

\*

**Niaj eldonaĵoj.** "For la Neŭtralismon": tia estas la titolo de la broŝuro. En 16 paĝoj nia k<sup>do</sup> Sennaciulo esploras ĉiufanke kaj metode la demandon pri organizado, li ekzamenas kaj kritikas la diversajn tendencojn kiuj konkurencas en la solvo de tiu problemo... kaj post tiu kribro li prezentas sian planon, t.e. la planon de S.A.T. — Tiun broŝuron, kies nuntempa graveco estas evidenta, ĉiu S.A.T.ano devas ne nur legi, sed legatigi; ĝi estas bonega propagandilo por nia afero.

Por ties diskonigon faciligi ni vendas tiun broŝuron tre malkare: 0,50 fr fr. (afranke) por Francio kaj landoj kun monkurzo egala aŭ super al franca franko, — 2,00 Mkg. (afranke) por Germanio kaj ceteraj kurzsufertaj landoj. — La germanianoj mendu kaj pagu senpere al nia agento en Leipzig; (k<sup>do</sup> Richter F.C. Sommerfelder Str. 44. ptr., Leipzig-Stött.). Leipziger poŝtĉeko 45170. La aliaj mendu al ni mem en Paris.

Tuj post la apero de ĉi-tiu broŝuro estos liverata al presado la materialo por *Internacia Legolibro*. Tiun verkon nun prilaboras k<sup>do</sup> Hugot-Raison kun la kunlaborado de k<sup>do</sup> el multaj landoj. En venonta "Informilo" ni pli detale parolos pri tio.

Jam de longe ni estis ricevintaj de *H. Barbusse* la rajton traduki kaj eldoni lian verkon: "La Lueur dans l'Abime" (Eklumo en Abismo). Sed por plenumi tiun gravan kaj delikatan taskon



estis necese trovi kompetentulon havantan sufiĉe da tempo kaj sindonemo. Malfacila klopodado. Fine nia kompetenta kaj laborema k<sup>do</sup> Else konsentis preni sur sin tiun entreprenon, kies mastrumadon ni komisiis al li. Kompreneble estus bone se oni helpus. Kiuj el la franclingvanoj konsentos helpe traduki, ĉiu po kelkaj paĝoj, tiuj bonvolu sin anonci al la Redaktoro de la gazeto, 24 Boule<sup>d</sup> Beaumarchais Paris (XI).

Ĉiuj "Satanoj" malpacience atendas tiun valoran verkon, kiu estos proksimume 150—160 paĝa.

\*

**Agento financa.** Ni sciigas al niaj k<sup>doj</sup> germaniaj ke ili povas sendi sian monon (abono, aniĝo k.t.p.) al k<sup>do</sup> Richter F.C., Sommerfelder Str. 44 ptr, Leipzig-Stött. Leipziger poŝtĉeko 45170. Ni atentigas ke tiu ĉi k<sup>do</sup> estas agento nur financa; li enkasigos ĉian monon al li senditan, sed ne rajtos ekz. liveri membrokartojn. Sekve, por la regula kaj akurata funkciado de la Administracio, ni petas la germaniajn membrojn agi jene: ĝiri la monon senpere al k<sup>do</sup> Richter, citante la destinon de tiu mono (nomo kaj adreso de ĉiu abonanto aŭ aniĝanto, k.t.p.), kaj samtempe sciigi al ni, almenaŭ per poŝtkarto, pri tiu mensendo, ankaŭ citante la nomon kaj adreson de ĉiu abonanto aŭ aniĝanto. — Unuavide, tiu procedo ŝajnas iom komplika, sed ĝi tree malpliigos la poŝtelpezojn.

**Komisiono:** lu membro skribas ke li scivolas la nomojn de la Komisionanoj. Komprenebla estas tiu scivolemo . . . , kaj ni mem miras ke ni ne ankoraŭ pensis ilin publikigi.

jen do la nomoj de la "nekonatuloj".

k<sup>do</sup> Banmer sekretario. 23 rue Boyer, Paris (XX)  
 " Coldefy kasisto. 15 rue de Bellefond, Paris (X)  
 " Glodeau gazetadministranto. 177 rue de Bagnolet, Paris (XX)  
 " Lanty gazetredaktoro. 24 boulevard Beaumarchais, Paris (XI)  
 " Migny helpa-administranto, 19 rue Parmentier, Paris (XI)  
 " Piron helpa-sekretario. 50 allée du Midi, La Garenne-Colombes, (Seine).

k<sup>do</sup> Besnard, 2 rue Popincourt, Paris (XX)

\*

**Pri la 2a Kongreso.** Pri la dato kaj loko de la Kongreso ni ricevis de k<sup>do</sup> Toŝkov (Batak. Bulgario) sugestojn . . . kiujn ni ne povas konsideri tial ĉar ili alvenis tro malfrue.

De li ankaŭ, kaj de aliaj membroj ni ricevis respondojn al nia demando pri akcepto de "reklamoj" en nia Revuo. Dankon al ĉiuj, sed ĉar la financa situacio de nia entrepreno plibonigis de kiam ni eldonas la revuon en Leipzig, tial ni povas flankelasi provizore tiun demandon.

\*

**Kelkaj konsiloj.** Skribu legeble vian nomon kaj adreson, kaj tiamaniere ke ni ne maldistingu la familian nomon de la nometo, Tekstu la ĉekojn (kaj la francianoj la poŝtmandatojn) nome de nia sekretario: Banmer.

La 10-marto 1922 la Sekretario de S.A.T.

## Leterkesto:

**A. Posener:** Via "Viziono" estas vere tro vizia. Ĉu do vi ne scias, ke en Esperantio estas ankaŭ militglorantoj, generaloj, juĝistoj k. s. eminentuloj. Ordinare eĉ tiuj personoj prezidas la esp. kongresojn. Demetu viajn verdajn okulvitrojn, Kamarade. — E. L.

**R. en H.:** S. A. T. ne havas kiel U. E. A. 6 pagitajn oficistojn. Ĉio estas de ni farata senpage, malpage eĉ, dum niaj liberaj horoj. Do?? — E. L.

**K<sup>do</sup> Moreno** — (Pri altigo de abonprezo). Ni ne rajtas postuli ekstrapagon de la abonintoj pro la altigo de la poŝtelspezoj. Se ili konscias ŝuldi ion, S. R. bonakceptos monhelpon de tiuj K<sup>doj</sup>. — L. G.

"Himno pri int. barbarismo"-Essen: Mi kvitancas la ricevon de via dua sendo; sed antaŭ ol enpreni mi bezonas scii ĉu tiu verkajeto estas originalo aŭ traduko ktp. — Niaj legantoj rajtas esti informataj. Ni nepre deziras doni al la Revuo karakteron je seriozezo kaj fidindeco. Pluan sciigon mi atendas. — E. L.



## KORESPONDADO

**TARIFO:** Unu enpresoj, 0 fr. 75. — Tri enpresoj, 2 fr. Dek-du enpresoj, 6 fr.

**MALLONGIGOJ:** L = letero. PK = poŝtkarto. PI = poŝtkartoj ilustritaj. PM = poŝtmarkoj. bfl = poŝtmarko sur bildflanko. k.ĉ.l. = kun ĉiuj landoj. Esp-ajo = Esperantajo.

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribiĝis.

### Belgio

K<sup>do</sup> Léon Bergiers, 11 Rue Lauwers, La Hulpe (Province de Brabant). L, PK, k.ĉ.l.

Bruxelles, la tieaj S. A. T. anoj kunvenas ĉiumerkrede je la 8<sup>a</sup> ĉe Carbonelle, 23 Boulevard Lemomnier. (Tion notu la alilandaj K<sup>doj</sup> trapasantaj Bruxelles).

### Bulgario

K<sup>do</sup> Jordan Georgiev, "Piroto" 2, Plovdiv. L, PI, pri komunismo.

### Ĉeĥoslovakio

K<sup>do</sup> Fr. Stribsky, Hajenska ul 445, Kladno, kun seriozuloj, interŝanĝas gazetojn.

### Finnlando

K<sup>do</sup> Leo Romppainen, Antinkatu 33, Helsinki. L pri politiko, k.ĉ.l. (krom Cehosl., Francio kaj Germ.). Junulo Wäino Ruohisto, Alkutie 76, Oulunkylä, dez. kor. kun 15—16 jaraĝaj gejunuloj k.ĉ.l.

### Francio

La Pariza revoluciema Esp. Grupo deziras gekorespondontojn por siaj laboristaj lernantoj. Ĉiuj Temoj pritraktotaj sed precipe: komunismo, socialismo, sindikatismo, anarkismo, feminismo, socia movado, strikoj, vivkondiĉoj, ktp. — Sin turni al: Gilbert Ragnier, 1 rue du Marché Popincourt, Paris XI<sup>e</sup>.

### Germanio

K<sup>do</sup> Kurt Wallas (seruristo), Weidentalstr. 20 II, Dresden-29, L, PM, bfl, PM. k.ĉ.l.  
 K<sup>do</sup> Albrecht Liebs (tramisto), Schiller Str. 39, Dresden-N., L, PK, PI, k.ĉ.l.  
 K<sup>do</sup> Nonnenmann, H., Lazarettstr. 38 I, Stuttgart-Cannstadt, L pri monismo, ateismo kaj polit.  
 En Türkheim apud Stuttgart, kaj en Zuffenhausen, fondigo de laborista grupo. — Novaj kursoj. Adr.: K<sup>do</sup> Grimm, O., Esslinger Str. 39, Türkheim.  
 K<sup>do</sup> Karl Baumann, Werderstr. 24, Frankfurt a. M. West 13, PMK, k.ĉ.l., en rekomendita letero; sendu la unuan.

### Hungario

K<sup>do</sup> Ladislav Unterberger, Dálnoli-str. 24 I. 16, Budapest VI, PI kaj L, k.ĉ.l.

### Japanio

S<sup>ro</sup> Ichiro Aski, 77/7 chome, kami-Tsutsui, Kobe, dez. interŝanĝi, PM, PK, k.ĉ.l.

## Rusio

K<sup>do</sup> J. V. Varankin, Mironoziekaja str. 9, N-Novgorod, pri ĉiuj temoj k. ĉ. l.

K<sup>do</sup> V. Beleglazov, str. de Frocke 3, Eakterinburg, k. ĉ. l.

K<sup>do</sup> Anatolio Volohov, Kambarovskaja 48, Tambov, k. ĉ. l.

K<sup>do</sup> Leontenkov, A. J., studento Jurijevskaja 17, k. 16, Nijmij-Novgorod, L, PK, k. ĉ. l., pri scienco kaj arto.

K<sup>do</sup> A. Kostanov, Katoliĉeskaja 5, Astrahanj, pri esp. movado, socia vivo, naturo, moro ktp.; kolektas kaj interŝanĝas Pl, PM, Sigelm. esp. librojn, gazetojn ktp.

## Svedio

K<sup>do</sup> Adol Herlin, Vardskolmeri 16, Sodertåje, PK; PM-kun seriozaj kolektantoj, k. ĉ. l.

Oskarshamm, fondiĝo de stud-klubo esperantista ĉe la tieaj komunistoj. En Paskallavik (vilaĝego) kurso kun 20 p. — Axel Wahmann.

Gekamaradoj ĉiulandaj atentu!

La Laborista Esp. Grupo de Dresden intencas aranĝi Esperanto-ekspozicion dum proksima aŭtuno. Bonvolu alsendi ĉiajn esperantajojn, gazetojn ktp. Ĉiuj ricevitajoj estos kvitancataj. Adresu jene: K<sup>do</sup> Friedrich Knittel, Pillnitzerstr. 23, Dresden-A. — Plue, tiu K<sup>do</sup> peras adresojn al ti-kiuj deziras korespondi kun Dresdenaj K<sup>doj</sup> pri komunismo, socialismo, sportmovado ktp.

Tiuj, kiuj interesigas pri edukado, devas legi la ĵus aperintan revuon:

## novaj tempoj

Tiu revuo, esperante redaktata, pristudas problemojn edukajn laŭ proletariara vidpunkto, kaj raportas pri edukaj elprovoj, movadoj. Ĉar teknika kaj samtempe ĝenerala ĝi estas, ĝin povas legi profite instruistoj kaj ankaŭ neinstruistoj.

Sin turni por sciigoj pri abono al:

Sino Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine INF.), Francio.

## ĴUS APERIS:

# For la neŭtralismon

de  
Sennaciulo

*Necesega broŝuro por propagandi la celon de S. A. T.*

Prezo aŭfranke: 0,50 fr. fr. por Francio kaj landoj kun monkurzo egala aŭ supera al franca franko.  
2,00 mk. G. por germanio kaj ceteraj kurzsufertantaj landoj.

(la germanianoj mendu kaj pagu senpere al nia agento en Leipzig — K<sup>do</sup> F. C. RICHTER, Sommerfelderstr. 44 — Leipziga poŝtĉeko 45170 :: la aliaj al ni mem en Paris).

## Ne Forgesu

Kamaradoj ke la Redaktoro zorgas pri la gazeto tute senpage, — malpage estus eble pli ĝuste! — kaj nur dum siaj liberaj horoj. Estas nepre necese, ke oni helpu ilin jenmaniere:

1-e Ĉiu artikolo aŭ komunikaĵo devas esti tre legeble skribita, kaj nur sur unu sola flanko de la folio;

2-e La Kamaradoj, ne tute certaj pri la korekteco de siaj skribaĵoj, bonvolu prizorgi larĝajn margenon kaj linian interspacon;

3-e La korespondantoj neniam forgesu ripeti sian adreson en ĉiu letero.

4-e Oni sendu al la Redaktejo nenion koncernan je la administra fako.



Por produktado  
de presajoj ĉiuspecaj en  
ĉiuj lingvoj por privatuloj, societoj,  
organizajoj rekomendas sin la laborista presejo

## Uns-Produktivgenossenschaft

Elisenstrasse 163, LEIPZIG (Germanio)

verkoj // broŝuroj // gazetoj // revuoj // katalogoj // komercaj  
jarraportoj // flugfolioj ktp. ĝis la plej multnombra  
komisio // unu- kaj multkoloraj presajoj  
plej ekzakta kaj akurata liverado  
ĉe moderaj prezoj



Bone aranĝita aparta specialfako por ĉiuj esperantaj presajoj